

# REGO

☆ **RUSIA ESPERANTO-GAZETO** ☆

*movada revuo en kunlaboro kun REU*

*Nº 3-4 (70-71) julio 2012*



*en la numero*

*mallonga populara krokodilologio*

*tutmonda ekzameniĝo kaj eventoj en Jekaterinburg*

*Muslim Magomajev kaj Esperanto*

*novaj versaĵoj de Klara Ilutoviĉ kaj nova traduko el Vitalij Bianko*

*“Bulteno de REU”, novaĵoj kaj multo alia*

***Moskvo, 2012***

## enhavo

- 01 Mallonga populara krokodilologio (N.Gudskov)
- 12 356 esperantistoj samtempe ekzamenigis en 17 landoj
- 12 KER-ekzameno en Moskvo
- 13 Jubileaj eventoj en Jekaterinburg (R.Kudrjavceva)
- 16 Ĉe diabla rokaro (V.Opletajev)
- 18 Rememoroj aperas pri la tagoj pasintaj (O.Ŝiljajeva)
- 19 Esprimo-8 en Tomsk (V.Minin)
- 20 Bonaero gastigos la UK-on en 2014
- 21 Prefikse uzataj E-vortoj (A.Gončarov)
- 31 Muslim Magomajev kaj Esperanto (V.Aroloviĉ)
- 33 Skize pri Volgia Esperantista Renkontiĝo
- 33 Rekomendoj de la partoprenantoj de VER-15
- 34 Jubilea E-kurso de ILEI nuligita
- 35 Reta intervjuo kun la germana esperantisto Brandenburg
- 35 Informo pri la 125-jariĝo de Esperanto en Belorusio
- 35 Forpasis Jevgenij Perevertajlo
- 36 REU-kotizoj por 2012
- 36 Pagmanieroj
- 37 Forpasis prof. d-ro Ottó Haszpra
- 38 Vladivostokaj esperantistoj denove en Harbin (A.Titajev)
- 39 Ekspozicio kaj simpozio pri la temo “Konstruitaj lingvoj por la globalizita mondo”
- 41 Diplomoj pro la fidela membreco
- 41 Jarlibro 2012 aperis
- 42 Esperantistoj en RIO+20
- 43 1000 mesaĝoj de la Ural-Siberia dissendolisto (V.Opletajev)
- 45 Ne multnombra, sed efektiva (D.Cibulevskij)
- 46 Poŝtmarko pri la 125-jariĝo de Esperanto
- 46 Historio, nuno kaj estonto en la aprila Malferma Tago
- 47 Preparu E-donacon por Boris Strugackij (M.Bronŝtejn)
- 47 Nova eldono de plena lernolibro (B.Kolker)
- 48 Pri la romano de S.Tanejev “La preĝo” (E.Tarĥan)
- 50 Verko de Karel Čapek en la serio “Oriento-Okcidento”
- 51 UEA eldonis kolekton de premiitaj eseoj pri la Esperanta literaturo
- 52 Vitalij Bianki. Kukolido (esperantigis N.Djomuškina)
- 56 Versaĵoj de Klara Ilutoviĉ
- k3 Elurbigo jubilea (M.Bronŝtejn)
- k4 Tutmonda KER-ekzameno en Moskvo kaj Bonaero (fotoj)



Nikolao Gudskov kun juna nila krokodilo apud Asŭano, Egiptio

## REGo

(Rusia Esperanto-Gazeto)

Nº 3-4 (70-71) julio 2012

aperadas ekde 2000

**redaktas** Garik Kokolija  
**kunredaktas** Viktor Aroloviĉ  
**kunlaboras** Maksim Griŝin

materialoj de REGo povas esti  
 represataj, kondiĉe ke la tekstoj restos  
 senŝanĝaj kaj estos indikita la fonto  
 poŝta adreso: Pjaticnikoje ŝosse 45 – 105  
 125310 Moskvo, Rusio  
 retadreso: gazeto@mail.ru

### abontarifoj por 2012:

por loĝantoj de Rusio kaj aliaj landoj  
 de KŜŜ – 500 rubloj, sendandaj al:  
 Коколия Георгий Владимирович  
 Пятницкое шоссе 45 – 105  
 125310 Москва

aŭ pagendaj al: 410011382499386  
 en la pagsistemo “Яндекс.Деньги”

por loĝantoj de aliaj landoj – 25 eŭroj  
 pagendaj al la konto **kklg-r** ĉe UEA  
**elektronika abono** – 200 rub. (5 eŭroj)

# Mallonga populara krokodilologio

## Ĉarme teruraj estaĵoj

Krokodiloj estas tre popularaj bestoj. Ĝenerale grandaj rabaj bestoj elvokas homan respekton, en praaj kulturoj ili fariĝis totemoj aŭ simboloj de dioj kaj estas objekto de adorado (sed samtempe – jen kia kontraŭdiro! – tre dezirata ĉaspredo). En Egiptio, ekzemple, ekzistas krokodilforma dio Sebeko, floris kulto de la krokodiloj kaj oni faris el mortintaj krokodiloj mumiojn, kiujn oni nun povas vidi en kelkaj muzeoj; apud la fama antikva templo Kom-Ombo nun funkcias speciala muzeo, kie oni povas vidi kvardekon da tiaj mumioj. Samtempe estas strange, ke en Biblio krokodiloj ne estas menciataj (kvankam en Palestino ili vivis ĝis fino de la 19-a jc.) – la monstro Levjatano, pri kiu tie temas, havas al realaj krokodiloj malmultan rilaton – almenaŭ ĉar loĝas en la maro...

La vorto “krokodilo” devenas de la greka κροκόδειλος – “gruza vermo” – verŝajne pro la haŭto, simila al ŝtona mozaiko.


Ekzistas multaj legendoj, mitoj, sentencoj kaj fabeloj pri krokodiloj ĉe diversaj popoloj, eĉ la nordaj, malgraŭ tio, ke ĉiuj krokodiluloj loĝas en tropikaj kaj subtropikaj landoj.

Tamen jen stranga fakto, ĉerpita el estiminda historia fonto – oficiala Pskova kroniko: “En la jaro 1582... En tiu jaro eliris krokodiloj rabaj bestoj el la rivero kaj la vojon baris; multajn homojn ili mordis. Kaj terurigis la homoj kaj en la tuta lando preĝis al dio. Kaj la bestoj kaŝis sin, kaj iujn oni mortbatis...” Kiel la krokodiloj povis aperi en la norda rusa urbo, dum jarcentoj restas enigmo, kvankam alporto de ekzotikaj bestoj al Eŭropo, inkluzive krokodilojn, dum la Mezepoko estis ofta afero – ĝis nun en la katedralo de Sevilo pendas granda remburita krokodilo, kiu iam antaŭ jarcentoj vivis en la loka bestejo. Tamen, la klimato en Sevilo estas multe pli taŭga por krokodiloj ol en Pskovo, kaj alklimatigi la nilan krokodilon en Gvadalkiviro estus tute reale,



*la krokodilkapa egipta dio Sebeko*





*areo de la familioj de la krokodiluloj*

diference de la glaciiganta vintro rivero Velikaja...

Kiel imagis la mezepokaj eŭropanoj krokodilojn, oni povas vidi laŭ la famega statuo de sankta Teodoro, kiu ornamas kolonon en Venecio. (Tamen pri tio, kiun rilaton havas tiu sanktulo al la krokodilo kaj kion ĝi ĝenerale signifas ĉi-kaze, unueca opinio ne ekzistas.)

La plej vaste konataj strangaĵoj en legendoj pri la krokodilo estas, unue, tio, ke ĝia supra makzelo estas moviĝanta anstataŭ la malsupra, kaj, due, ke krokodiloj



*remburita krokodilo en la katedralo de Seviljo*

priploras sian predon manĝante ĝin. La unua legendo venas el zoologiaj verkoj de Aristotelo, kiu mem krokodilojn ne vidis, sed apogis sin je rakontoj de vizitintoj de Egiptio (ekzemple, verkoj de Herodoto), ne bone konintaj la krokodilan anatomion. Pro troigite granda aŭtoritato de Aristotelo la erara imago vivis ĝis la fino de la mezepoko.

La dua afero, pro kio la krokodilo fariĝis simbolo de hipokriteco, estas bazita sur tute korekta observo! Temas pri krokodilaj larmoj, kiuj vere abunde aperas dum la besto manĝas. Tamen ploras krokodiloj ne pro emocioj (dubinde krokodilo havas aliajn emociojn rilate al manĝata besto, krom plena kontento), sed pro tio, ke superflujajn por sia organismo salojn, trafantajn tien kun manĝata viando, ĝi rapide ellasas helpe de la larmaj glandoj. Do, la krokodilaj larmoj ekzistas reale, sed ekster kiuj ajn moralaj konsideroj kaj instruoj...

Malgraŭ sia populareco kaj strebo de multaj havi la ekzotikan beston hejme, krokodiloj taŭgas nur por grandaj terarioj de zoologiaj ĝardenoj; junaj malgrandaj krokodiletoj rapide kreskas kaj fariĝas tro grandaj kaj mordemaj bestegoj, kiujn tutegale finfine necesos transdoni al la plej proksima zooĝardeno. Sed esperantistoj, laŭ siaj asertoj, renkontiĝas kun ili pli ofte ol ĉiuj ceteraj homoj, tial ni sube parolu iom pri la rolo de krokodiloj en ilia vivo.

... La fina grava rimarko: kutime oni kredas kaj diras, ke “la krokodilo estas verda” (eble ankaŭ pro tio la esperantistoj havas iujn specialajn sentojn rilate al ili?). Tial oni ofte ilin desegnas verdaj, faras verdajn ludilojn ktp. Tamen reale eĉ ne unu specio de krokodiluloj estas vere verda: plej ofte ili estas malpure brunaj, flave-brunaj aŭ havas pli aŭ malpli malhelan olivkoloron – la lasta kazo estas ekstrema alproksimiĝo al la (griz)verda koloro. Do la verda krokodilo estas precipe fabela estaĵo.



*originalo de la statuo de Sankta Teodoro, troviĝanta sur kolono en Venecio*

## Krokodiloj en Esperanto-kulturo

Gaston Waringhien en la libro “1887 kaj la sekvo...” rakontas la jenan historion. Komence de la 1930-aj en Parizo vivis italdevena esperantisto Emilio Ferrari, kiun oni nomis per kromnomo Napoleono. Li estis taksiisto, kaj sur lia takσιο certe estis la verda stelo; por kolegoj li gvidis Esperanto-kurson. En 1932 li fariĝis kelnero en la kafejo “Imperator” (eble, tio estas la fonto de la kromnomo!?), kaj vizitadis ankaŭ la kafejon “Le Talma”, kie okazadis renkontiĝoj de esperantistoj (cetere, post la dua mondmilito li akiris ankoraŭ unu profesion – frizisto). Kiam li aŭdis, ke iu parolas france, li kolere kriis: “Kiu estas tiuj krokodiloj?” La esprimo estis konstante ripetata, kaj tial transiris al ĉiuj parizaj renkontiĝoj, kaj de la parizanoj ĝin transprenis partoprenantoj de internaciaj kongresoj. Rezulte, fine de la 1930-aj ĝi jam fariĝis komuna esprimo de la tutmonda esperantistaro. Kompreneble, Ferrari povis uzi kiun ajn insultovorton por la obstinuloj, aŭdacaj paroli la nacian lingvon en esperantista societo (kial ne “serpentoj”, “kameloj” aŭ “aze-noj”?), sed li elektis krei “krokodiloj” – kaj ĝi mirinde enradikiĝis!<sup>1</sup>

Do, la vorto “krokodilo”<sup>2</sup> kaj la derivita el ĝi verba formo “krokodili” fariĝis pure esperantista kultura apartaĵo (ne malpli karakteriza ol, ekzemple, la verbo “kabei”) kaj eĉ eniris en tiom seriozan eldonaĵon, kiel PIV! Esperantistoj, ne tute fremdaj al zoologio, disvastigis la semantikan kampon de la nocio “paroli inter esperantistoj ne en Esperanto” al parencaj grupoj de reptilioj, kaj en la vortaro de tabuaj vortoj de Renato Corsetti k.a. “Knedu min sinjorino!”<sup>3</sup> aperis jam tia bukedo de difinoj:

✧ *krokodili* – paroli nacilingve en esperantista medio

✧ *aligatori* – paroli nacilingve en lingvo, kiu estas gepatra lingvo nur de parto de la ĉeestantaro

✧ *kajmani* – paroli nacilingve en lingvo, kiu estas gepatra lingvo de neniu ĉeestanto

Tiuj vortoj aperis en rondoj de TEJO, ŝajnas, ne pli frue ol en la 1970-aj jaroj.

Krom tio, ekzistas ankaŭ esprimoj *gaviali* (“malkrokodili”, t.e. paroli en Esperanto en neesperantista medio, – kie ĉiuj komprenas iun alian lingvon, – uzante Esperanton kiel esoteran aŭ kaŝlingvon), *reptiliumi* (komuna nocio por “krokodili”, “aligatori” kaj “kajmani” – plej ofte oni diras simple “krokodili”) kaj *lacerti* – kun du malsamaj signifoj: a) paroli inter esperantistoj alian planlingvon, ekzemple Volapukon; b) paroli en denaska lingvo, komprenebla por alinaciano pro simileco inter la lingvoj (ekzemple, kiam hispano parolas hispane kun portugalo). La lastaj vortoj estas, tamen, tre malofte uzataj (necerta signifo de *lacerti* tion montras bone).

Nu, bildo aŭ figureto de krokodilo fariĝis unu el la plej vaste uzataj objektoj en

---

<sup>1</sup> Oni povas renkonti aankaŭ liajn versiojn pri la deveno de la nocio “krokodili” (ekz., ke ĝi aperis en la kurso de Andreo Ĉe), tamen ili evidente apartenas al esperantista folkloro.

<sup>2</sup> Cetere, la vorto “krokodilo” ofte estas uzata kiel simpla sinonimo de “neesperantisto”; kaj “krokodila societo” povas esti kaj “esperantista societo, kie oni reale ne uzas Esperanton”, kaj ankaŭ ĝenerale “neesperantista societo”.

<sup>3</sup> Eld. La Kancerklinikoteko, 1987

la Esperanto-medio. Al ĉiu kompreneblas la “vojsigno” kun signifo “ĉi tie oni ne krokodilas”:

Bildkartoj kaj figuretoj de krokodiloj fariĝis unu el ŝatataj kolektoobjektoj de esperantistoj. Eĉ pli, ili servas kiel “ritaj” objektoj! Ekzemple, en SEJToj (Sovetiaj Esperantistaj Junularaj Tendaroj), kiuj aktive funkciis kiel amasaj aranĝoj en Sovetio en la 1960-aj – 1990-aj jaroj (en la lasta periodo, kompreneble, jam ne kiel “sovetiaj”, sed kiel “someraj”), ekzistis granda zorgado pri lingva disciplino. Ĉiumatene la homo, kiu dum la antaŭa tago plej multe krokodilis, ricevis krokodileton sur ŝnuro kaj devis porti ĝin dum la tuta tago kiel signon de puno. Fine de la tendaro la plej obstinaj krokodiloj ricevis “donace” ludilan krokodilon... Bedaŭrinde, kaj SEJToj, kaj la rigora lingva disciplino, kaj koncernaj ritoj en rusiaj E-aranĝoj en la 2000-aj jaroj estingiĝis...



## **La birdo krokodilo**

Krokodilululoj, de la zoologia vidpunkto, apartenas al la klado Arĥosaŭroj (*Archosaurs*). Al tiu, krom ili, apartenis kelkaj formortintaj ordoj de bestoj, ĉefaj el kiuj estas vaste konataj pterosaŭroj kaj du ordoj de dinosaŭroj – Saŭriskioj (*Saurischia*) kaj la Ornitiskioj (*Ornithischia*), kaj ankaŭ birdoj, devenintaj de certaj Saŭriskioj. Ĉiuj ili havas komunajn praulojn el Tekodontoj, vivintaj jam fine de la Permia epoko antaŭ 260 milionoj da jaroj. Do al tiu grupo apartenas kaj tiuj, kiujn oni kutime nomas “reptilioj”, kaj tiuj, kiuj de la kutima vidpunkto ne estas reptilioj. Sekve, de la filogenia vidpunkto, la krokodiluloj estas pli proksimaj parencoj de birdoj, ol de aspekto pli similaj al ili lacertoj. Konsiderante, ke ĉiuj aliaj arĥosaŭroj, krom krokodiloj kaj birdoj, formortis, fakte estus logike nomi krokodilululojn subklaso de birdoj, aŭ birdojn – subklaso de krokodiloj... Tamen birdoj donis tiom da specioj, adaptiĝintaj al tiom diversaj vivkondiĉoj, kaj tiom ŝanĝiĝis dum lastaj 150 milionoj da jaroj, dum krokodiloj restis preskaŭ samaj!<sup>1</sup> Tial oni longe konsideris logika lasi la krokodilojn en la sama klaso kun iliaj malpli proksimaj parencoj, kaj por la birdoj doni apartan klason<sup>2</sup>! Sed nuntempe en la zoologia taksonomio venkas alia tendenco: ne lasi en la sama klaso grade similajn, sed filogenie neparencajn grupojn de organismoj. Tiu tendenco – *kladismo* – ankoraŭ ne penetris ĉiujn zoologiajn lernolibrojn, kaj ne aperis iu unueca taksonomio, bazata sur ĝi, sed ĝi evidente disvastiĝas. Do, “la birdo krokodilo” estas, certe, esprimo ŝerca, sed tiu ŝerco reflektas iom da vero!

<sup>1</sup> Konsideru tamen, ke la specioj, genroj kaj familioj de krokodiluloj, kiuj ekzistas nun, estas aliaj ol tiuj, kiuj loĝis en Juraso, Kretaceo aŭ Paleogeno!

<sup>2</sup> Kaj mi ne dubas, ke, se la alia grupo de arĥosaŭroj – tre aktivaj flugantoj, varmakorpaj kaj kovritaj de felo pterosaŭroj – ĝisvivus nian tempon, la zoologoj donus al ĝi rangon de klaso – same kiel al la birdoj.

## **Iomete pri la anatomio kaj fiziologio**

Krokodiloj estas duonakvaj bestoj – plejparton de la vivo ili ja pasigas en akvo, sed la nestojn konstruas sur la tero, kaj la ovoĵ evoluas tie. Ĉiuj iliaj adaptaĵoj estas ligitaj kun la vivo en la akvo.

La haŭto de krokodiloj estas kovrita per kornecaj ŝildetoj, kiuj sur la dorso kaj ventro formas regulajn vicojn. Sub la dorsaj, kaj foje ankaŭ sub la ventraj ŝildetoj aperas *osteodermoj* – ostaj tabuletoj, kiuj formas kirason.

La kranio de la krokodiloj apartenas al la diapsida tipo – kun du tempiaj arkoj, al la sama tipo apartenas kranioj de la dinosaŭroj kaj sfenodonuloj (novzelandaj tuataroj). La spino de ĉiuj specioj havas 7 kolajn vertebrojn, 17 korpajn kaj 35-37 vostajn. La ventron protektas la ventraj ripoj, ne ligitaj al la vertebraro. La dentoj estas similformaj, konusaj, situantaj en alveoloj kaj malplenaj interne – en la malplena spaco evoluas novaj akraj dentoj, kiuj anstataŭas la eluzitajn. Tio okazas ĉiujn 2-3 jarojn. La dentoj de la supra kaj malsupra makzeloj distribuiĝas tiel, ke kontraŭ la plej malgrandaj dentoj de la supra makzelo troviĝas la plej grandaj de la supra, kaj inverse.

Nazaj truoj ĉe plejparto de la krokodiloj iom elstaras super la muzelo, pro kio ili kapablas spiri plene kaŝiĝante en la akvo. Ankaŭ por la sama celo elstaras super la kranio la okuloj. La naza kavo kaj la faringo estas dividitaj de la buŝo per la sekundara osta palato, pro kio krokodilo povas malfermi la buŝon sub la akvo, daŭre spirante. La akvon en la spira faringo ne enlasas speciala klapo en profundo de la buŝo, kaj la aero eniras la traheon malantaŭ ĝi. La pulmoj estas grandaj, enhavas grandan provizon de aero; reguligante la volumenon de la pulmoj, krokodilo povas ŝanĝi sian specifan pezon. La pezocentron por naĝado en diversaj pozicioj en la akvo ĝi reguligas helpe de movoj de diafragmo.

La stomako havas dikajn muskolajn vandojn, kaj en ĝi ofte troviĝas ŝtonoj (*gastrolitoj*), kiuj helpas rasi la nutraĵojn. Krome, la ŝanĝo de pozicio de la ŝtonoj helpas reguligi la pezocentron de la besto dum naĝado.

Ĉiuj arĥosaŭroj havas kvarkameran koron. Por birdoj (kaj, evidente, pterosaŭroj kaj plej vivaktivaj dinosaŭroj) tio ebligas disdividi du ringojn de la sangocirkulado kaj aktivigi la metabolismon, dank' al plena apartigo de la arteria (oksigenita) kaj la vejna (reduktita) sangoj. Pro tio birdoj (same kiel mamuloj) povas teni konstantan temperaturon de la korpo; al tio kapablis ankaŭ pterosaŭroj kaj plej evoluintaj dinosaŭroj. Sed la krokodiloj havas ial kaj la dekstran, kaj maldekstran aorto-arkojn (birdoj kaj mamuloj – nur la maldekstran), kaj la sangoj, malgraŭ disdividiĝo en la koro, en la loko de interkruciĝo de la arkoj tutegele povas miksiĝi pro ekzisto de speciala truo! Tial la krokodiloj ne subtenas konstantan korpotemperaturon – ĝi dependas de la temperaturo de la medio kaj ŝanĝiĝas je kelkaj (de 1,5 ĉe plenkreskaj ĝis 5 ĉe junaj estaĵoj) celsiaj gradoj dum la tagnokto – malgraŭ ĉiuj premisoj por tio, kvankam povas reguligi gradon de intermiksiĝo de la oksigenita kaj reduktita sango en la arterioj. Kial ili do bezonas la miksitajn sangon? Ekzistas teorio, ke la arteria sango, nutranta la stomakon, enhavanta karbondioksidon (CO<sub>2</sub>), stimulas altiĝon de la acideco de la stomaksuko, kaj tio tre gravas por digesti la tutan englutitan de la raba besto predon – ne nur viandon, sed ankaŭ ostojn, haŭton



kaj aliajn tute malfacile digesteblajn substancojn... Tio des pli gravas, ke la krokodilo ne maĉas la manĝaĵon, sed englutas grandegajn pecojn.

Hemoglobino de la krokodiluloj kapablas transporti multe da oksigeno (multe pli ol la nia) kaj povas funkcii ne nur en la eritrocitoj, sed ankaŭ en la sangoplasmo...

Krokodiloj kreskas dum la tuta vivo (do grandaj specimenoj estas pli aĝaj ol la pli malgrandaj de la sama specio), seksan maturiĝon atingas kutime en la aĝo 8-10 jaroj. Vivas ili ĝis la aĝo 80 kaj eĉ, foje, 100 jaroj.

La nerva sistemo estas evoluinta sufiĉe bone, la cerbo havas kortekson pli evoluintan ol ĉe ĉiuj ceteraj reptilioj (sed malpli ol ĉe la birdoj). La aŭd- kaj vidkapabloj estas bonaj; krome, la krokodiloj havas specifan sensilon, kiel adaptaĵon por vivo en la akvo – en formo de specifaj perceptiloj sur la makzeloj, kiuj sentas ŝanĝojn de akva premo kaj vibradon de la akvo, kaŭzitan, i.a., de la potenciala predo.

Alta evoluo de la cerbo estas akompanata de sufiĉe komplika konduto. Cetere, tio riveliĝas en la reprodukta konduto. La femalo metas ovojn (de 20 ĝis 100) en kavon en la tero (sablo), enfosas ilin kun miksaĵo de la tero kun herbo kaj folioj, kaj gardas la neston ĝis la idoj komencas eliri el la ovoj. Ŝi helpas al ili, singarde prenas en la buŝon kaj portas en la akvon. Ĉe kelkaj specioj la patrino plu protektas la idojn dum kelkaj jaroj ĝis ili fariĝas sufiĉe grandaj, ĉe aliaj post ilia elkoviĝo ŝi ĉesas zorgi pri ili.

## **Modernaj krokodiloj**

Krokodiluloj aperis en Triasa epoko, antaŭ pli ol 200 milionoj da jaroj, kaj formis dekojn da familioj kaj milojn da specioj, plejparto el kiuj delonge ne plu ekzistas. Modernaj krokodiluloj apartenas al tri familioj – krokodiledoj, aligatoredoj kaj gavialedoj, de ok ĝis naŭ genroj kaj 23-25 specioj, kiujn mi sube listigos sen apartaj priskriboj, indikante nur la areojn kaj grandecojn.

Reprezentantoj de la familioj facile distingeblas laŭ la formoj de la muzeloj. Por ke la esperantistoj estu veraj krokodilologoj, mi mallonge karakterizos ĉiujn nuntempajn reprezentantojn de la glora ordo.

Krokodiledoj diferencas de la aligatoredoj unuavice laŭ la dentoj. Kiam la makzeloj de krokodilo estas fermitaj, estas videbla la granda kvara dento de la mal-supra makzelo, dum ĉe aligatorio la supra makzelo kovras ĉiujn dentojn. Vera krokodilo havas akran, V-forman muzelon, dum aligatorio – malakran, U-forman. (Tuj notu: kajmanoj ne estas aparta familio, ili apartenas al aligatoredoj kaj konsistigas en la familio kelkajn genrojn.) Gavalio havas karakterizan longan muzelon.

## **La familio Krokodiledoj, aŭ veraj krokodiloj (*Crocodylidae*)**

La plej granda familio de la ordo konsistas el 3 aŭ 4 genroj, kiuj inkludas 14 aŭ 15 speciojn.

**Mara krokodilo** (*Crocodylus porosus*) estas la plej granda krokodilulo – maskloj ĝis 6-7 m longaj kaj ĝis 1000 kg pezaj (kutime, tamen, malpli grandaj); la seksa dimorfismo (duformismo) estas plej esprimita inter ĉiuj krokodiluloj, kaj femaloj, do, ne atingas longon pli ol 3,5 m. Sur la muzelo ĝi havas du krustojn, irantajn de la okuloj ĝis la unua triono de la muzelo. Junaj krokodiloj estas malhel-flavaj kun

nigraj makuloj kaj strioj sur la tuta korpo; poste ili malheliĝas. La ventro estas senstria, flava aŭ blanka. Plej abundas ili en la Norda Aŭstralio, sed renkonteblas ĉie ĉe la bordoj de la orienta Hinda oceano kaj okcidenta Pacifika oceano de Srilanko ĝis Solomonaj insuloj; ĝi kapablas naĝi en maro, kie renkonteblas je centoj da kilometroj (ĝis mil) de la bordo. Ĝi foje atakas kaj renversas boatojn kun homoj. En kelkaj landoj ĝi estas bredata pro la valora haŭto. Aŭstralianoj foje plene erare nomas ĝin “aligato”, eble pro malakra muzelo.

**Nila krokodilo** (*Crocodylus niloticus*) La plej fama, ĉar ĝia areo atingis landojn kun antikvaj civilizoj kaj proksimas al Eŭropo. Nuntempe pli norde ol la Asŭana alta digo en Nilo ili ne ekzistas, tamen renkonteblas en preskaŭ ĉiuj landoj de la Centra, Orienta kaj Suda Afriko. Ĝi estas la dua laŭ la grandeco inter la krokodiluloj – ĝis 6 m longa. Esploroj de DNA sugestas, ke la subspecio, loĝanta en la centra kaj okcidenta Afriko, estas reala memstara specio – *Crocodylus suchus*. Nilaj krokodiloj havas malhelan bronzecan koloron supre, kun nigraj punktoj dorse kaj malhelpurpuran sur la ventro. Flankoj, kiuj estas flaveverdaj, havas malhelajn makulojn laŭ oblikvaj strioj. Ekzistas koloraj variaĵoj, specimenoj el fluantaj akvoj tendencas esti pli helaj ol tiuj el lagoj aŭ marĉoj. La okuloj estas verdaj. Nilaj krokodiloj estas ĝis nun multnombraj – ekzemple, nur en la artefarita lago Naser, aperinta pro konstruo de la alta digo en Asŭano, estas 90000 krokodiloj. Tamen, se ni komparas tiun krokodilan loĝantaron kun la homa loĝantaro en Egiptio (ĉ. 90000000), ni vidos, ke en tiu, klasike krokodila lando, ekzistas ne pli ol po unu krokodilo por mil homoj...

**Fajnmuzela (Akromuzela) krokodilo** (*Crocodylus acutus*) estas granda (ĝis 5 m longa) kaj loĝas en la centra Ameriko, Karibaj insuloj, suda Florido kaj nordo de la Suda Ameriko. En Ameriko ĝi estas la plej granda sovaĝa besto.

**Kuba krokodilo** (*Crocodylus rhombifer*), 2,5 m longa, loĝas nur sur kelkaj insuloj apud Kubo; tre proksimas al la Akromuzela krokodilo.

**Orinoka krokodilo** (*Crocodylus intermedius*), loĝanta en baseno de la rivero Orinoko, estas tre granda – ĝis 6 m longa. La koloro ŝanĝiĝas laŭ la aĝo – komence ĝi estas grizverda kun nigraj dorsaj strioj, poste iĝas bronzkolora kun malhelaj disaj makuloj, fine fariĝas unutona malhelgriza. La ventro estas kremoflava uniforme kun malhelaj makuloj ĉe la vostobazo.


**Marĉa krokodilo** (*Crocodylus palustris*) loĝas en Hindio kaj apudaj landoj, atingas longon 4-5 m, griza aŭ grize-bruna. Ĝi pli bone ol aliaj krokodiloj fartas sur la bordoj, kie foje eĉ postkuras ĉasaĵon; kaj en seka periodo fosas truojn.

**Siama krokodilo** (*Crocodylus siamensis*), 3-4 m longa, loĝas sur Hindaĉinia duoninsulo, kaj insuloj Javo kaj Borneo. Similas la maran krokodilon (kun kiu eĉ kapablas doni fertilajn hibridojn), sed estas pli hela kaj multe pli malgranda.


**Novgvinea krokodilo** (*Crocodylus novaeguineae*) loĝas sur la koncerna insulo kaj atingas longon 3,5 m. La koloro estas grize-bruna, pli malhela kun nigraj strioj ĉe la vosto.



*Alligator mississippiensis*



*Gavialis gangeticus*



*Crocodylus niloticus*

*reprezentantoj de la tri familioj de Krokodiluloj*

**Filipina krokodilo** (*Crocodylus mindorensis*), loĝanta nur sur la Filipina insularo, atingas longon 3-3,5 m, tre proksimas al la Novgvinea krokodilo, kies subspecio estis antaŭe konsiderata. Ĝi havas relative larĝan muzelon kaj dikajn ostoplastojn en sia dorso. Filipinaj krokodiloj estas flavbrunaj, kun nigraj makuletoj kaj malheliĝas laŭ la aĝo.

**Meksikia krokodilo** (*Crocodylus moreletii*), atinganta longon 3 m, loĝas precipe sur la duoninsulo Jukatano. La Meksika krokodilo estas malhelgrizecbruna. Ĝi havas malhelajn zonojn kaj punktojn ĉe la korpo kaj la vosto. Tiu similas al aliaj krokodiloj kiel la Centramerika krokodilo, sed la Meksika estas iom pli malhela.

**Dolĉakva krokodilo** (*Crocodylus johnstoni*) loĝas en la Norda Aŭstralio, diference de sia samlandano – Mara krokodilo – neniam en la maro; ĝi estas malgranda (2-3 m longa) kaj havas mallarĝan muzelon.

**Afrika mallarĝmuzela krokodilo** (*Crocodylus cataphractus*) loĝas en la Okcidenta Afriko kaj havas averaĝan longon 2,5 m (sed povas esti pli granda). La koloroj estas diversa – de bruna kaj olivkolora ĝis preskaŭ nigra, ĝi havas nigrajn makulojn sur la tuta korpo. Laŭ la lastaj esploroj de DNA oni apartigas tiun ĉi specion je aparta genro *Mecistops* kun la sola specio *M. Cataphractus*.

**Nana krokodilo** (*Osteolaemus tetraspis*), la plej malgranda el ĉiuj krokodiledoj – kutime malpli ol 1,5 m longa, maksimume – 1,8 m longa; ĝi loĝas en la Okcidenta Afriko. Ĝi estas nigra, la ventro estas flava kun nigraj makuloj. La specion oni dividas je du subspecioj, kaj certaj zoologoj konsideras la duan subspecion kiel apartan specion *O. osborni* (a. Congo dwarf crocodile, r. конголезский тупорылый крокодил).

### **La subfamilio Tomistominae**

**Gavialeska krokodilo** (Pseŭdogavialo, Falsa gavialo – *Tomistoma schlegelii*) loĝas sur la insuloj de Indonezio kaj en suda parto de Hindoĉinia duoninsulo. Ĝi havas tre akran longan muzelon, similan al tiu de la gavialo (kaj, same kiel gavialo, manĝas precipe fiŝon). La koloro estas ĉokolade-bruna, kun nigraj makuloj. Ĝi atingas longon 5 m.

### **La familio Aligatoredoj (*Alligatoridae*)**

De la veraj krokodiloj la familio distingiĝas per la konstruo de la kranio, malpli longa kaj pli larĝa muzelo, nevideblaj dentoj kiam la buŝo estas fermita, kaj per malpli agresema kaj pli pigra karaktero. Ili estas ĝenerale malpli grandaj. La vorto devenas de la hispana “el lagarto”, kio signifas simple “lacerto”. Ĉiuj aligatoredoj, krom la ĉina, loĝas en Ameriko. La familio inkludas 4 genrojn kaj 8 speciojn; ĉiuj aligatoredoj, krom la du reprezentantoj de la genro *Alligator*, kutime nomiĝas “kajmanoj”.

**Misisipa, aŭ amerika aligatorio** (*Alligator mississippiensis*) loĝas en la sudorienta parto de Usono, la longo atingas 3-4,5 m. Vintre ne aktivis, en pli malvarmaj regionoj povas enfali veran vintran dormon, kiun travivas en truoj. Ĝenerale, ĝi estas la plej malvarmrezista reprezentanto el ĉiuj krokodiluloj. La femaloj protektas ne nur ovojn, sed ankaŭ junajn idojn, foje eĉ dum kelkaj jaroj.

**Ĉina aligatorio** (*Alligator sinensis*) estas ne granda: ne pli ol 2 m longa, flavegriza kun nigraj makuloj sur la malsupra makzelo. Nuntempe renkonteblas nur en



la baseno de Jangzio. La specio estas ege malofta kaj endanĝerigita, en la naturo restis nur ĉ. 200 ekzempleroj.

### **La genro *Caiman***

**Krokodila kajmano** (*Caiman crocodilus*) loĝas en la Centra kaj Suda Ameriko (norda parto), atingas longon 1,4-2,5 m. Junaj kajmanoj estas flavaj kun nigraj makuloj kaj strioj, la plenkreskaj estas olivkoloraj. Ili kapablas iomete ŝanĝi la korpokoloron (sed ne tiomgrade, kiel hameleonoj!) pro specialaj ĉeloj-melanoforoj en la haŭto.

**Larĝmuzela kajmano** (*Caiman latirostris*) loĝas en la centra kaj orienta parto de la Suda Ameriko, atingas longon 2-3 m, la koloro estas heloliva.

**Jakara (Paragvaja) kajmano** (*Caiman yacare*) renkonteblas en Paragvajo kaj najbaraj landoj, atingas longon 2,5-3 m, ĝiaj malsupraj dentoj estas pli longaj ol la supraj kaj povas iom elstari el la buŝo. Ĝi proksimas al la krokodila kajmano, kies subspecio oni ĝin antaŭe konsideris.

### **La genro *Paleosuchus***

**Nana kajmano de Cuvier** (*Paleosuchus palpebrosus*) renkonteblas en Amazonio kaj nord-orienta parto de la Suda Ameriko. Ĝi estas la plej malgranda el la krokodiluloj – la maskloj atingas longon maksimume 1,6 m, la femaloj estas ne pli ol 1,2 m longaj.

**Nana kajmano de Schneider** (*Paleosuchus trigonatus*) estas iom pli granda ol la nana kajmano de Cuvier (ĝis 2,2 m longa, sed la femaloj ne atingas eĉ longon 1,5 m, kutime havas nur 1,1 m), malhele brunkolora kaj renkonteblas en la samaj landoj kiel la nana kajmano de Cuvier (sed havas iom malpli grandan areon). La haŭto havas plej multe da ostaj tabuletoj el ĉiuj krokodiluloj.

### **La genro *Melanosuchus***

**Nigra kajmano** (*Melanosuchus niger*) loĝas en la norda parto de Amazonio kaj atingas longon 4,7 m. Ĝi estas la plej granda aligatoredo kaj dua laŭ la grandeco sud-amerika besto (post la orinoka krokodilo). La koloro estas tre malhela, preskaŭ nigra, kun grizaj aŭ flavaj strioj sur la flankoj (ĉe pli junaj ekzempleroj).

### **La familio Gavialetoj (*Gavialidae*)**

Al la familio nuntempe apartenas unusola specio – **ganga gavalio** (*Gavialis gangeticus*). Ĝin karakterizas speciale longa muzelo, kies longo superas la larĝon de tri- ĝis kvinoble, la dentoj estas longaj kaj akraj kaj direktiĝas iom antaŭen kaj flanken. Ĉio ĉi helpas kapti fiŝojn, gavalio estas la plej specialiĝinta nuntempa krokodilulo por fiŝkaptado. Ĝi estas sufiĉe granda – ĝis 5 (kaj pli) metrojn longa (femaloj ĝis 3 metroj), sed, feliĉe, neniam atakas homojn – la gavalioj manĝas precipe fiŝon. Onidire, gavalioj estas la solaj reprezentantoj de krokodiluloj, kiujn eblas iomgrade malsovaĝigi. Gavalioj loĝas en la Norda Hindio kaj najbaraj landoj (cetere, en la najbaraj al Hindio landoj ili apenaŭ restis). La specio estas tre endanĝerigita, en la 1970-aj jaroj en la naturo restis nur 70 ekzempleroj! Pro specialaj protektaj rimedoj kaj artefarita bredado nun da ili estas ĉirkaŭ 1500, kio, ja, ankaŭ ne estas tro multe...

*Nikolao Gudskov (Moskvo)*

## 356 ESPERANTISTOJ SAMTEMPE EKZAMENIĜIS EN 17 LANDOJ

Sabaton, la 9-an de junio 2012 okazis la Tutmonda Skriba KER-ekzamensesio de UEA kaj ITK (Ŝtata Lingvoekzamena Centro en Budapeŝto), en kiu samtempe ekzameniĝis laŭ la Komuna Eŭropa Referenckadro (KER) 356 esperantistoj en 29 urboj de 17 landoj. Flanke de la UEA-komisiono pri la ekzamenoj, Katalin Kováts preparis tiun eventon dum pluraj monatoj helpate de sesdedo da lokaj organizantoj kaj utiligante la rimedojn de la retejo <edukado.net>. En dudek lokoj okazis ankaŭ apartaj preparkursoj kaj provsesioj.

En diversaj lokoj la evento altiris ankaŭ ekstermovadan atenton. En pluraj urboj ĉeestis ĵurnalistoj kaj eĉ televidaj teamoj. En multaj lokoj la ekzamenon malfermis eksteraj funkciuloj: lingvisto, bibliotekestro, universitata katedrestro, urbestro kaj gvidantoj de diversaj lokaj asocioj. En kelkaj lokoj ili eĉ gvidis la sesion. En unu loko okazis kontrolvizito de la direktoroj de ITK. Raportoj kaj fotoj estis publikigitaj ĉe <edukado.net> kaj en la paĝo de UEA en Facebook.

Jen estas la ekzamenlokoj: Tecamac kaj Tijuana (Meksiko); Moskvo kaj Jakaterinburg (Rusio); Parizo, Fontaine-Grenoble, Arras, Liono, Tuluzo, Limoĝo, Avinjono, La Roche-sur-Yon, Clermont-Ferrand (Francio); Kuritibo (Brazilo); Tokio kaj Oosaka (Japanio); Bonaero (Argentino); Busan (Sud-Koreio); Kuala Kangsar (Malajzio); La Chaux-de-Fonds (Svislando); Helsinko (Finnlando); Senta (Serbio); Kopenhago (Danio); Herzberg (Germanio); Vicenza (Italio); Kalio (Kolumbio); Lesjöfors (Svedio); Rigo (Latvio); Torino (Italio).

Post tiu ĉi ekzamensesio la kvanto de la ĝisnunaj ekzamenitoj atingis 923.

*Gazetaraj Komunikoj de UEA*

### KER-EKZAMENO EN MOSKVO

La 9-an de junio en la vasta kaj komforta ejo de la Instituto de administrado kaj komerco (“INFO Rutenia”) en la urba distrikto Borisovo sukcese pasis la Tutmonda skriba KER-ekzameno, kiun partoprenis 30 personoj el Moskvo, Apudmoskvo, Sankt-Peterburg. Laŭ niveloj: B1 – 4 personoj, B2 – 10, C1 – 16. La laboraĵoj estas ekspeditaj al Budapeŝto, kie speciala ekzamenkomisiono kontrolas ilin, kaj la rezultojn ĉiu kandidato ricevos rete al sia elektronika adreso. Komence de aŭtuno ni enmanigos la diplomojn al ĉiuj sukcesintoj. Espereble, ĉiuj ricevos la deziratajn diplomojn. Komence de decembro por sukcesintoj en la skriba parto estos ebleco trapasi la parolan parton, akcepti kiun speciale venos al Moskvo 3 akademianoj: K.Kováts (Nederlando), R.Corsetti (Italio) kaj A.Löwenstein (Italio). Estos ebleco por dezirontoj, kiuj ne pretis kaj ne sukcesis aliĝi al la ĵusa sesio, trapasi ambaŭ partojn. Atendu la anoncojn kaj senprokraste aliĝu. Estas perfekta ebleco ne nur kontroli siajn sciojn de la lingvo, sed ankaŭ ekposedi la internacian diplomon, agnoskantan en la Eŭropa Unio. Gratulojn al la partoprenintoj, dankon al la helpantoj kaj kuraĝon al la kandidatoj en la nova etapo!

*Svetlana Smetanina, vicprezidanto de REU,  
reprezentanto de ILEI en Rusio, ĉeforganizanto de la ekzameno*

## JUBILEAJ EVENTOJ EN JEKATERINBURG

La 9-12-an de junio en Jekaterinburg sukcese pasis aranĝoj, dediĉitaj al la 125-jara jubileo de Esperanto, kiujn iniciatis E-klubo “Arĝenta Flamo”. Tio estis tri tre diversaj tagoj, kiam uralaj esperantistoj kaj kelkaj gastoj-partoprenintoj el pli mal-proksimaj urboj povis denove unuiĝi kree kaj ideoe.

En la unua tago, la 9-an de junio, ni partoprenis Esperanto-ekzamenon laŭ la KER-reguloj enkadre de la tutmonda E-agado okaze de la jubileo de Esperanto; la 10-an de junio, en la dua tago, okazis interesa E-programo, kiu pasis en la urbo, en tre komforta luita renkontiĝejo; en la lasta, tria tago ĉiuj dezirantoj ricevis eblecon partopreni turisman marŝon kaj kunriprozi eksterurbe ĉe pitoreska naturo.

La tuta programo de tiuj tri tagoj estis planita tiel, ke ĉiu deziranto povis aliĝi en ajna el la tagoj al la elektitaj laŭ sia ŝato aranĝoj. Entute ĉirkaŭ 40 esperantistoj el 9 urboj partoprenis la E-aranĝojn dum tiuj tri tagoj.

Esperable, traleginte la sube prezentitajn raportojn, rakontojn, impresojn,



verkitajn de diversaj aŭtoroj, legantoj de REGO povos imagi la multkoloran mozai-kon de la E-aranĝoj, dediĉitaj al la 125-jariĝo de Esperanto kaj sukcese realigitaj junie en la urala ĉe-furbo.

\* \* \*

En Jekaterinburg la 9-an de junio en komforta konfe-rencio de la regiona

biblioteko “Belinskij” sukcese pasis, kadre de la tutmonda agado dediĉita al 125-jariĝo de Esperanto, trnivela skriba KER-ekzameno, kies ĉefa loka organizanto estis Aleksandr Osincev.

La ekzamenon partoprenis 21 personoj el 7 urboj: Jekaterinburg, Tjumenj, Ĉeljabinsk, Kamiŝlov, Surgut, Samara, Glazov; inter ili 8 personoj ekzameniĝis laŭ la nivelo B1, kvar personoj – laŭ B2, kaj 9 personoj ekzameniĝis laŭ la nivelo C1. Dum la ekzameno asistis kiel observanto Viktor Anatoljeviĉ Kloĉkov – konata en la urbo ĵurnalisto, iama aktiva urala esperantisto. Laŭ unuanima opinio de ĉiuj partoprenintoj la ekzamena procedo estis organizita senriproĉe. La laboraĵoj nun jam estas forsenditaj per poŝto en Eŭropon al KER-ekzamenkomisiono. Esperplene ni atendas la rezultojn!

Fotojn de la ekzameno vidu ĉe <[http://vk.com/album-32574768\\_158468364](http://vk.com/album-32574768_158468364)>.

\* \* \*

Ni ĝojas informi, ke dum kelkaj tagoj antaŭ, dum kaj post la KER-ekzameno



en Jekaterinburg ni sukcesis okazigi aktivan reklam-kampanjon en amaskomunikiloj pri Esperanto kaj ĝia 125-jara jubileo.

La 8-an de junio Aleksandr Osincev estis intervjuita de la Regiona televidkanalo. Tiun 7-

minutan intervjuon vi povas vidi ĉe <<http://youtu.be/kvyi5p7vxlx>>.

La 9-an de junio eĉ tri TV-kompanioj: “Vesti-Ural” ĉe la ŝtata TV-kanalo “Ruŝio”, Regiona TV-kanalo kaj TV-kanalo ATN vizitis la KER-ekzamenon, okazigitan en la regiona biblioteko “Belinskij”, kaj faris siajn raportaĵojn pri la evento. Dum 2 tagoj, la 9-an kaj la 10-an de junio, en novaĵelsendoj de la menciitaj TV-kanaloj kelkfoje tage estis prezentitaj tiuj raportaĵoj. Ni povas aldoni, ke multaj niaj gekonatoj-neesperantistoj telefonis al ni dum tiuj tagoj kaj diris, ke ĵus ili vidis kaj aŭdis informon pri Esperanto televide. La informon vi povas vidi ĉe <<http://youtu.be/yybshsfl1am>>.

La publikaĵo pri la KER-ekzameno en Jekaterinburg aperis en “Oblastnaja gazeta” (la Regiona gazeto). Ankaŭ en la reta novaĵejo Just-Media aperis informo pri la ekzameno kun la titolo “Другой ЕГЭ” (“Alia Unueca Ŝtata Ekzameno”): <<http://www.justmedia.ru/news/society/2012/06/13/110960>>.

Ni atendas aperon julie de la artikolo pri Esperanto, dediĉita al ĝia 125-jariĝo en la gazeto “Uraljskij raboĉij”, kiun verkis la observanto en la KER-ekzameno en Jekaterinburg, konata urba ĵurnalisto V.A.Kloĉkov.

La 13-an de junio 2012 A.Osincev kaj V.Kudrjavcev estis intervjuitaj en la “Radio Ural” (Радио России – Урал). La elsendo estis aŭskultebla la 19-an de junio kaj per kabla radia reto ekde 08.00 ĝis 08.30 matene kaj ankaŭ ripetigis dum la tago. Ni opinias, ke ĉio ĉi estas nia kuna granda sukceso, kaj tio helpas altiri pli da atento al Esperanto kaj en Jekaterinburg aperos pli da interesotoj pri nia lingvo.

***informo por la dissendolistoj, preparita de Viktor Kudrjavcev (Jekaterinburg)***

\* \* \*

La dua tago de la renkontiĝo havis sufiĉe vastan spektron de la programeroj. Okazis tre interesa leciono pri la temo “Esperantistoj kaj esperantistaj kluboj”, en kiu sendepende de la aĝo kaj E-spertoj povis partopreni ĉiuj – kaj novbakitaj esperantistoj, kaj E-spertuloj. Ĝin preparis kaj okazigis Vladimir Opletajev, kiu elektis kaj lerte uzis por la leciono tiujn instru-formojn kaj rimedojn, kiuj ebligis al li kapti intereson de ĉiuj partoprenintoj kaj vervigi ilin. Ŝajnis, ke li ĉion faris senĝene kaj gaje, aldonante elementojn de ludo. Sed mi ja scias, ke malantaŭ ĉio ĉi estis lia granda laboro super la instrumaterialo, la profunda pripenso de ĉiuj elemen-



toj. Rezulte la partoprenintoj konstatis, ke eĉ al la fino de la leciono, post du instruhoroj, neniu perdis la viglan intereson kaj ne laciis lerni.

En la programero, kiu nomiĝis “Krei liberan kulturon”, Aleksandr Osincev rakontis al ni pri la aŭtora rajto kaj kopirajto, pri diferencoj inter tiuj du. Por multaj el ni tio estis novaj, klerigaj kaj tre utilaj scioj. Post tio Aleksandr ankaŭ prezentis surekrane kelkajn intervjuojn, faritajn kun li por diversaj urbaj TV-kanaloj kadre de la informkampanjo pri Esperanto.

Dum la jubilea kvizo pri Esperanto, kiun ankaŭ preparis kaj proponis por la ĉeestanta publiko Vladimir Opletajev, ni ĉiuj kun intereso mergiĝis en la 125-jaran historion de Esperanto, rememoris aŭ eksciis interesajn faktojn el E-historio, kulturo kaj literaturo. La partoprenintoj kuraĝe respondis al 84 proponitaj demandoj, kaj fine gajnis juna, sed tre klera esperantistino el Ĉeljabinsk Darja Zelenina, kiu estis premiita per valora E-libro.

Dum la sekva programero “Entuziasmi por Esperanto”, kiun gvidis mi mem, mi rakontis pri okazigita en la urbo informkampanjo pri Esperanto por la amaskomunikiloj, pri la rezultoj de la antaŭe anoncita konkurso de eseoj sub la titolo “Fenomeno Esperanto”, kies laŭreato iĝis Lidija Jerofejeva el Niĵnij Tagil. Pri sia laboro pri komputila “Inversa E-Vortaro” interese rakontis esperantistoveterano el Ĉeljabinsk Viktoro Laptev. Poste okazis mallonga disputo, dum kiu la partoprenintoj povis opiniinterŝanĝi pri Es-





peranto, nuna E-agado, iom paroli pri la estonteco de nia lingvo kaj nia imago pri ĝi, ankaŭ pri tio, kiel ni povus agi por ke nia E-komunumo plifortigu.

Ŝajnas, ke grandan plezuron ĉiuj ĉeestintoj ricevis de la okazigita deklam-

konkurso, partoprenita de novuloj kaj spertaj esperantistoj, kiuj libervole elektis kaj prezentis siajn ŝatatajn poemojn pri Esperanto. Aŭskultinte ĉiujn partoprenintojn, kiuj deklamis arte en tre diversaj manieroj, la publiko aktive voĉdonis, kaj min tre ĝojigis, ke rezulte de la voĉdonado la 1-2-3-an lokojn ricevis niaj gejunuloj: Jana Husanova, Darja Zelenina, Sergio Lokis. Ili ĉiuj ankaŭ estis premiitaj per valoraj Esperanto-libroj.

Belega fino de la tago estis komuna fotado por la memoro kaj amika teumado kun kukoj.

Mi esperas, ke tiuj tri tagoj donis novan bonan impulson al ĉiuj partoprenintoj kaj entute al E-agado de nia regiono.

*rakontis por legantoj de REGo Raja Kudrjavceva (Jekaterinburg)*

## ĈE DIABLA ROKARO

La organizantoj de la KER-ekzameno en Jekaterinburg decidis inde ripozigi nin – la stresitajn ekzamenitojn – kaj ĝuigi nin malavare per uralaj naturbelaĵoj. La 11-

an de junio ili sukcesis dum varma sunriĉa tago irigi dudekon da scivolemaj paŝantoj en la montetan arbaron apud la fervoja stacio Isetj. Iniciatis kaj planis la itineron de la piedira marŝo Viktor Kudrjavcev, kiu es-



tas fervora turisto, bona konanto kaj esploranto de ĉirkaŭaĵoj. Ĉiusomere li migras al riveraj kaj arbaraj kaŝejoj por malkovri neordinarajn lokojn kaj pli bone ekkoni la naturon de la Urala regiono.

Dekdukilometra ir-revena marŝo por spertaj turistoj povas esti nur bagatela promeno, sed por multaj el nia



pozgrupeto la ascenda vojo en la humida arbara varmo evidentiĝis ŝvitiga tasko, kiel, ekzemple, por la nevidantaj jekaterinburgaj geesperantistoj Lena kaj Eŭgeno, heroe paŝintaj kune kun aliaj preter ŝtonegoj, falintaj arbotrunkoj, trans marĉetojn ĉe rojoj. Krome, ni estis avertitaj pri la akara danĝero, kiu malgraŭ niaj preventaj zorgoj tamen abrupte realiĝis per iksoda atako al unu el la knabinoj. Kvankam la akarulo provokis ioman panikon, ni ĉiuj volonte piknikis ĉe la fajro, tostis je la sano de la juna naskiĝtagulino Katja Zamislova el Jekaterinburg, multe fotis, ludis pilkon kaj entuziasme studis la naturan fenomenon “Diabla rokaro”, kiu antaŭ niaj okuloj krute altiĝis surpinte de la arbokovrita monto.

La granita ŝtonmuro, multe taŭzita pro la venta kaj pluva erozioj, havas nun ekstere fantastecean, originale matrakan strukturon, kvazaŭ Diablo mem koboldis ĉi tie ĉizante bizarajn formojn. La rokĉeno logas por trejnado multajn mont-grimpantojn, kiuj senlace konkeras ĝiajn pintojn en la alto de kvar-kvinetaĝa domo. Sed pluraj esperantistoj – kuraĝuloj el nia grupo – vizitis la rokaltaĵon atinginte ĝian pinton de la suda flanko pere de lignaj eskaloj metitaj ĉe la krutaj ŝton-





muroj. De la kapturita altaĵo ili salutis en Esperanto fotopretajn gapantojn ĉe la murpiedo malsupre.

La vojo returne estis malpli streĉa, ĉar ni pli multe descendis deklivojn, sed reatinginte la fervojan stacion ni ĉiuj sentis laciĝon de la piedoj, kiuj venigis nin al la loko neforgesebla pro sia natura beleco. Bedaŭrinde, la fabeloj ne povas daŭri longe, kaj la piedoj de kelkaj aliurbanoj direktis ilin senprokraste al la stacidomo por revena trajnveturo. Dankon al la jekaterinburganoj por la agrablaj kaj distraj marŝo kaj pikniko.

*Vladimir Opletajev (Surgut)*

## REMEMOROJ APERAS PRI LA TAGOJ PASINTAJ

Vagonservisto prenis mian bileton, voĉigis la loknumeron, kiu estis presita en la bileto, kaj bonvenigis min en la trajnon. Mi ĉirkaŭrigardis, lastan fojon enspiris jekaterinburgan noktan aeron kaj eniris en la vagonon. Post kelkaj minutoj la trajno ekveturis, forportante min okcidenten, en foran Udmurcion. Nur nun, kuŝante sur



vagonbreto, mi konkludis, kiajn mojosajn, neripeteblajn ripoztagojn ni havis. Tri tagoj (ekde la 9-a ĝis la 11-a de junio) pasis en amika inspirplena etoso, estis plenaj de “verdaj” babiladoj, novaj scioj kaj eltrovaĵoj. Sed pri ĉio – sinsekve.

La unua kaj la plej malfacila etapo estis trapasi KER-ekzamenon, kiu okazis posttagmeze la 9-an de junio. 21 esperantistoj el Jekaterinburg kaj pluraj aliaj urboj (Samaro, Ĉeljabinsk, Tjumenj, Surgut, Glazov, Kamiŝlov) ekzameniĝis laŭ 3 niveloj (B1, B2, C1). Fakte tiu ekzamensesio estis dediĉita al la 125-jariĝo de Esperanto, kaj tutmonde la ekzamenon en la sama tago partoprenis 356 personoj el 17 landoj. Niaj cerboj bolis, niaj manoj ŝvitis, foje niaj haroj hirtiĝis, sed ni eltenis tion, ja “tra densa mallumo briletas la celo”!

Do la ekzamena tasko estas skribita, kaj ural-siberiaj esperantistoj ekiris promeni tra Jekaterinburg. La ĉefa punkto de la promenprogramo estis la 54-etaĝa ĉielskrapanto “Visockij”. Necesas diri, ke oni oficiale malfermis la konstruaĵon la 25-an de novembro 2011 kaj speciale koincidigis la malfermon kun premiero de la filmo “Visockij. Dankon, ke vi vivas”. De sur rigardejo de la ĉielskrapanto estas videbla la tuta urbo. Domoj, aŭtoj, homoj sube ŝajnas tiaj malgrandaj, kvazaŭ ludilaj. Kvazaŭ en iu infana ludo, oni povas preni ilin kaj simple transmeti en iun alian lokon laŭplaĉe. Estas videbla ne nur la urbo, sed ankaŭ ĉirkaŭaĵoj – arbaroj, montoj kaj lagoj. Belega vidaĵo!

La dua tago de la renkontiĝo estis dediĉita al diversaj prelegoj, ludoj, konkur-



soj, kvizoj ktp. Ĉu eblas sukcese aranĝi lecionon samtempe por komencantoj kaj spertuloj, ĉu ekzistas diferenco inter kopirajto kaj aŭtorrajto, ĉu oni naskiĝas aŭ fariĝas esperantisto – pri ĉio ĉi vi eksciis, se partoprenus la duan tagon de nia aranĝo. Unu programero sekvis post la alia – jubilea kvizo, konkurso pri deklamado, spektado de kinofilmoj ktp ktp. Kaj certe, ne eblas amika esperantista renkontiĝo sen komuna koncerto kaj teumado.

La trian tagon la esperantistoj eksterurbiĝis. Per elektrovagonaro ni veturis al la Uralaj montoj. Kia bela naturo atendis nin! Freŝa aero, altaj abioj, arbustoj de mirtelo kaj vakcinio, arbara vojeto kaj la roko. Kia tento estis surgrimpri sur la rokon. Jes, la procedo mem ne estis facila, sed tion indas fari – de sur la plej alta pinto de la roko malfermiĝas nepriskribebla pejzaĝo! Eĉ fotilo ne povas precize reprodukti ĉion. Teo kun tortoj ĉe la lignofajro ankaŭ estas nerakontebla afero!

Tempo pasis nerimarkeble. Tiu estis la lasta tago de nia mojosa renkontiĝo.

Jes, ni loĝas en malsamaj urboj, miloj da kilometroj disigas nin, niaj veraj renkontiĝoj okazas ne tiom ofte, sed eble ĝuste pro tio nia amikeco estas la plej

kortuŝa, la plej varma kaj la plej bela en la mondo. Gaja, amika festo, bedaŭrinde, finiĝis. Sed restis agrabla sento, ke ne vane Zamenhof kreis la lingvon. Esperanto ne nur kunigas homojn, ne nur portas novajn emociojn kaj impresojn, sed ankaŭ malfermas talentojn, donas al homoj eblon kunlabori kaj krei pli belan, pli interesan mondon, kie multaj volus vivi...



***Olĝa Ŝiljajeva (Glazov)***

## **ESPRIMO-8 EN TOMSK**

En Tomsk sukcese pasis renkontiĝo de siberiaj kaj uralaj esperantistoj Es-Primo-8 la 29-an de aprilo – la 1-an de majo 2012. Al la renkontiĝo aliĝis 25 personoj, sed reale partoprenis nur 21 – el Tjumenj, Novosibirsk, Tomsk kaj Krasnojarsk. La programo grandparte estis tradicia. La aĝo de la partoprenintoj variis de 15 ĝis 77 jaroj. La alto – de 1,55 ĝis 2 metroj.

Okazis multaj intelektaj ludoj en Esperanto. En la ludo “PIV” (“naduvaloĉka” en la rusa lingvo) partoprenis 7 teamoj. La unuan lokon okupis teamo de Raŝida kaj Aleksej Birjulin (Tomsk), la duan – Vladimir Minin (Tomsk), la trian – Vladimir Jurganov (Novosibirsk). Okazis interpretista konkurso el la rusa en Esperanton kun 7 partoprenantoj. La ĉampiono de Uralo kaj Siberio iĝis Vladimir Minin, la

duan lokon okupis Aleksej Birjulin, la trian – Vladimir Jurganov. Ĉiuj tri venkintoj ricevis valorajn donacojn.

Esperantisto ekde 1957, doktoro pri ekonomikaj sciencoj, profesoro de Novosibirska Ŝtata Universitato Vladimir Afanasjeviĉ Sibircev prezentis sian (ruslingvan) libron “Vivo kaj racio. Malkovritaj misteroj de la Universo.” kaj iom rakontis pri siaj 7 antaŭaj ruslingvaj libroj. “Vivo kaj racio...” estas tradukita kaj eldonita ankaŭ en la angla lingvo kaj atendas dezirantojn traduki ĝin en Esperanton.

D-ro V.A.Sibircev prelegis interese ankaŭ pri la historio de OSER-oj (Okcident-Siberiaj E-renkontiĝoj). Okazis 49 OSER-oj en la jaroj 1968-1991. Kiu(j) okazigos la 50-an jubilean OSER-on? Li prelegis interese ankaŭ pri la E-fonduso en Novosibirsk.

Okazis seminario pri Suĝok-terapio far Viktor Obrazcov (Tomsk), interesa prelego pri la historio de la E-movado en Tomsk far Aleksej Birjulin (Tomsk), prelego “Vojaĝu per Pasporta Servo” far Marija Donova (Krasnojarsk) kaj Katerina Arbekova (Novosibirsk), vespero de E-ludoj far Nadeĵda Ĵarnikova (Tomsk). Okazis sportaj ekzercadoj: matena gimnastiko kaj ĵonglado per tenisaj pilkoj (Konstantin Obrazcov, Tomsk), bicikladoj (Aleksandr Iŝĉuk, Tomsk), lernado kaj ekzercado de dancoj (Irina Popova, Tomsk), bilardo, tablotenis. Estis ankaŭ koncerto de E-kantoj far Juriĵ Paseĉnikov (Tomsk), paroliga kurso por komencantoj (Olĵa Obrazcova, Tomsk), diskuto pri la E-movado en Rusio (Katerina Arbekova, Novosibirsk).

Konstantin Obrazcov okupiĝis pri la ĝenerala kunordigado, la solenaj malfermo kaj fermo, la ekskursoj en Tomsk, noktaj aktivadoj (E-babilado, E-kantado, spektado de E-kinofilmoj, intelektaj ludoj en Esperanto).

EsPrimo-8 fine estis kronita per vizito al la muzeo/metiejo de fama tomska skulptisto (kiu faras skulptaĵojn el ligno) Leontij Usov. Li estas ege sprita kaj populara persono en Tomsk – eble la plej fama tomskano en la mondo. Ankaŭ partoprenis tomska poeto Konstantin Fomin, kies malpermesitaj poemoj estis legataj en la renkontiĝo. L.Usov kaj K.Fomin estis elektitaj kiel honoraj membroj de Tomska E-klubo.

*Vladimir Minin (Tomsk), el <reu-agado>*

## **BONAERO GASTIGOS LA UNIVERSALAN KONGRESON EN 2014**

La 99-a Universala Kongreso de Esperanto en la jaro 2014 okazos en Bonaero. La Estraro de UEA elektis la ĉefurbon el inter tri argentinaĵ urboj, kun kies organizaj kondiĉoj la Konstanta Kongresa Sekretario Clay Magalhães antaŭe konatiĝis surloke.

Argentino gastigos UK por la unua fojo, sed Esperanto havas tie jam longan tradicion. La lingvo estis enkondukita en la landon en 1889 fare de la pola rifuĝinto Polasky. La landa asocio de UEA, Argentina Esperanto-Ligo, estis fondita en 1941. Ĉar unu el ĝiaj kunfondintoj estis Tibor Sekelj, estas bela koincido, ke la elekto de Argentino okazis ĝuste en la jubilea jaro de la 100-a datreveno de lia naskiĝo.

*Gazetaraj Komunikoj de UEA*

AL

Yunta englutis larmon. La viro ne rigardis al ŝi, nur etendis la manon kaj **albra-kumis** Yunta-n.

*István Nemere, or., Hungario, Krias la silento, Eld. Bero Berkeley, 2002, p. 176*

Unu usona geja paro eĉ **al-aviadilis** al Nederlando tuj post forsendo de telegramo...  
*Gerrit Berveling, or., Nederlando, Monato, 1996, 9, p. 13*

– Ne cia afero! Mi diris urĝa, do urĝa, **albojis** lin Udan.

*Eugene de Zilah, La Gazeto, 133 (dec. 2007), p. 8*

Hu! Ili nun scias kiom valoras ilia majstro. Li **albojis** ilin, kiel decas ke komandu la ĉefo:

– Kion vi prigapas, nenifaruloj?

*Eugene de Zilah, La Gazeto, 134 (jan. 2008), p. 5*

Tien li **alĉevalis** kaj ekvidis alkuri kontraŭ si tridek ŝafinojn.

*Baldur Ragnarsson, el la islanda, Islandaj pravoĉoj, Eldona Societo Esperanto, Malmö, Svedujo, 1964, p. 76*

... vi devas forlasi vian bienon kun via tuta domanaro kaj preni kun vi nur tiujn valoraĵojn, kiujn vi **aldecidas**...

*Baldur Ragnarsson, el la islanda, Islandaj pravoĉoj, Eldona Societo Esperanto, Malmö, Svedujo, 1964, p. 43*

Al ĉiu el ili la sorto **aldestinis** parulon same fierkarakteran dominieman kaj anime enfermitan en-si-mem.

*J.Kohen-Cedek, el la rusa, Fonto, 77 (maj. 1987), p. 6*

Tiel la milito kontraŭ Hitler sur la etika nivelo troviĝis senkompare pli alte ol la paco kian Hitler provis **aldevigi** en la okupitaj landoj.

*Vinko Ošlak, or., Slovenio – Aŭstrio, Literatura Foiro, 196 (apr. 2002), p. 60*

La vualo da zorgoj ombris la gajecon de ĉiuj **alestantoj**.

*L.C.Porto Kerreiro Neto, el la portugala, Emanuelo, Antaŭ du mil jaroj, Federação Espirita Brasileira, Brasil, 1993, p. 69*

Ĉi tiu Asembleo estis multnombre **alestata**.

*Baldur Ragnarsson, el la islanda, Islandaj pravoĉoj, Eldona Societo Esperanto, Malmö, Svedujo, 1964, p. 30*

... ke mi rivale volas konkuri kun nia Majstro, kiu – inter aliaj – ankaŭ multajn Pe-töfi-poemojn **alesperantigis** nesupereble bone.

*Miklos Feher, or., Hungario, La Kancerkliniko, 64 (okt-dec. 1992), p. 6*

---

<sup>1</sup> Similtemaj publikaĵoj jam aperis en REGO: “Prefiksaj E-vortoj mankaj en la rusa lingvo” (№№ 6 (61) – 2 (63), 2010-2011) kaj “Sufiksaj E-vortoj mankaj en la rusa lingvo” (№№ 3 (64) – 1 (68), 2011-2012).

Tiam, super iliaj kapoj iris io nigrega kaj grandega kun hurla blekado: Goo-goo-goo...

Hej! ĉu vi ne konas Mian Balenan Moŝton? Min oni **alnomas** la Kometo de la Maro.

*Konisi Gaku, el la japana, Miyazawa Kenzi, La Ĝemelaj Seloj, Japania E-Instituto, Tokio, 1984, p. 21-22*

Poste li **alfajrigis** la templon kaj bruligis lu tuton ĝiscindre.

*Baldur Ragnarsson, el la islanda, Islandaj pravoĉoj, Eldona Societo Esperanto, Malmö, Svedujo, 1964, p. 43*

Kaj sigelinte sian fian kontrakton, la du personiĝoj de la malamo kaj de la volupto **alkolektiĝis** al la frata rondo, sub la masko de la ŝajnaj zorgoj.

*L.C.Porto Kerreiro Neto, el la portugala, Emanuelo, Antaŭ du mil jaroj, Federação Espirita Brasileira, Brasil, 1993, p. 73*

– Tiu nun ne havas signifon, – Koller elegante strebis malrespondi. Sed la kuiristino energie **alkomunikis**...

*István Nemere, or., Hungario, Nesto de Viperoj, Impeto, Moskvo, 1994, p. 68*

– Sed mi ne komprenas do kial ...

– Fermu la faŭkon! – **alkrudis** lin Udan.

*Eugene de Zilah, La Gazeto, 134 (jan. 2008), p. 3*

... se traduki poezion signifas reprodukti muzikon, ni devas konscii ke per la **alingvo** ni uzas alian muzikilon. Kun propraj karakterizoj kaj potencialo.

*Giorgio Silfer, or., Italio – Svislando, Literatura Foiro, 229 (okt. 2007), p. 229*

... tro multa disparolo, kiam estis malkreskinta lia aroganteco, kaj multaj nun **almemoris** malnovan proverbon, ke falon antaŭas fiero.

*Baldur Ragnarsson, el la islanda, Islandaj pravoĉoj, Eldona Societo Esperanto, Malmö, 1964, p. 44*

La bandito ekmaltrankviliĝis. Li **alordonis** min eliri kaj kvietigi la virinon, timante ke ... ŝi elloĝeĝigos ankaŭ aliajn najbarojn. Kompreneble, li tuttempe celumis min.

*Jozo, or., Monato, 1981, 2, p. 18*

Sian nuancitan voĉon, sian senduban fascinon li uzis kiel ŝlosilojn por malfermi timigajn pordojn, kiujn la tiamaj junuloj ne kuraĝis **alproksimi**.

*Perla Martinelli, or., Italio – Svislando, Literatura Foiro, 177 (feb. 1999), p. 54*

– Nur mi konas la ordonojn. Komprenite? – **alraŭkis** lin Udan.

*Eugene de Zilah, La Gazeto, 134 (jan. 2008), p. 3*

Jen malfacila demando, kiun ne ĉiam **alrespondas** la ordinaraj vortaroj.

*Carlo Minnaja, or., Italio, Literatura Foiro, 149 (jun. 1994)*

Kaj okazis ke la studentoj de la institucio Kran gajnis jarfine ĉiujn premiojn pri **altraduko**...

*Literatura Foiro, 147 (feb. 1994), p. 13*

Vi ne havas tempon zorgi pri la pasinteco; kaj pri la estonteco vi ankaŭ ne pensis.

Vi scias nur, ke homo devas esti boato en la longa rivero kaj povu **alvizaĝi** la nuntempan transbordon.

*Zhang Xuesong, or., Ĉinio, Literatura Foiro, 201 (feb. 2003), p. 3*

El sigelita budo en la vidkampo de Sylvie Fabre li preskaŭ telefonis al sia patro, kiam oni ekmalkonstruis la kadukan aĉaĵon kiu najbaris la Wagner-domon. Tiu restis sola, **alĉielis** kvazaŭ lumturo borde de kanalo.

*István Ertl kaj Fabienne Berthelot, tr., Jan Echenoz, Terenoj de konstruo, Literatura Foiro, 140 (dec. 1992), p. 288*

Ŝi rigardis ilin de alte, **aletendis** flakonon de parfumo.

*István Ertl kaj Fabienne Berthelot, tr., Jan Echenoz, Terenoj de konstruo, Literatura Foiro, 140 (dec. 1992), p. 287*

Kion do vi deziras, se vi ne deziras pluresti kun ni? Pilgrimi suden mi deziras, **aljenis** Audun.

*Baldur Ragnarsson, el la islanda, Islandaj pravoĉoj, Eldona Societo Esperanto, Malmö, Svedujo, 1964, p. 76*

... nenie vi loĝu pli **alproksime** ol tuj oriente...

*Baldur Ragnarsson, el la islanda, Islandaj pravoĉoj, Eldona Societo Esperanto, Malmö, Svedujo, 1964, p. 43*

... klarigoj cetere tre bonvenaj por **alkompreni** la libron...

*Antonio Valén, or., Fonto, 162 (jun. 1994), p. 31*

Ĉion ĉi oni sentas sur ĉi tiu ekmatena vojo **alluma**, sur la marbordo Ĝuhu, en amas' ĉevala kaj fojnista...

*Probal Daşgupto, or., Hindio, Fonto, 241 (jan. 2001), p. 5*

Venis la t.n. alĝeria milito kaj mia **alforiro**. Ĉe mia reveno mi...

*Kris Long, or., La Gazeto, 99 (mar. 2002), p. 5*

Kaj neeviteble la maniero de Sadler neeviteble **alinvitas** obskurojn. Tiuj obskuroj laŭ mi...

*Baldur Ragnarsson, or., Islando, Norda Prismo, 1968, 1, p. 59*

“Bonega farso, bonega... sed por sinjoro ... l’...”

“De Klerk”, **alplenigis** sinjoro Van Dieren.

*F.Faulhaber, el la nederlanda, Tjeerd Adema, Dekkinga fuĝas, Dansk Esperanto Forlag, Abyhaj, 1957, p. 91*

Preskaŭ senescepte vendistinoj estis malsveltaj virinoj kun fortaj pulmoj kaj Didonita rajto **alfaŭki** klientojn.

*Trevor Steele, or., Aŭstralio, La Ondo de Esperanto, 1998, 5, p. 15*

Ĝi [evoluo de la E-movado] konis siajn **alsuprojn**, stagnojn kaj falojn depende de la sociaj kondiĉoj.

*Boris Kolker, or., Sovetio, Esperanto, 1979, 10, p. 163*

Sed ja ŝi estis tiel beleta kun vizaĝeto ribela kaj animplena, dume **al-alfajris** min ŝiaj belegaj okuloj...



*István Nemere, or., Hungario, Vi povas morti nur dufoje, HEA, Budapest, 1989, p. 41*

**Albruegis** nova vagonaro.

La suno larĝe **alklinis** la tapiŝon,

*El kolekto de Klara Ilutoviĉ, Moskvio, Elektrostalj, ricevita marte 1998*

Plej ofte li vekuĝis je la krio de la deĵoranto: “Fraŭlinoj! Al la tagmanĝo!” Tiam ankaŭ li **alpantoflis** al n-ro 7.

*F.Szilagy, el la hungara, Norda Prismo, 1966, 2, p. 116*

Poste li **alfajrigis** la templon kaj bruligis la tuton ĝiscindre.

*Baldur Ragnarsson, el la islanda, Islandaj pravoĉoj, Eldona Societo Esperanto, Malmö, Svedujo, 1964, p. 43*

## **ALI**

La ĵusa rakonto diras, ke sinsekvo de reliefigo kaj fonigo ĉiam aspektos absurda, eĉ se la rezulto estus **alvide** defendebla.

*Probal Daŝgupto, or., Hindio, Literatura Foiro, 162 (aŭg. 1996), p. 202*

Bedaŭrinde, iama spektaklo el televido, pri ŝarkoj, kaj **aliama** pri kankroj, devis malagrabla perpleksigi ŝin.

*Lorjak, or., Francio, Iluzioj, HEA, Budapest, 1982, p. 132*

Ni tri sidis ĉe la “bonŝanca” fino de la duoncirklo; la **alifinuloj** parolis unue.

*Trevor Steele, or., Aŭstralio, Neniu ajn papilio, Vieno: IEM, 2000, p. 255*

## **ANKORAŬ**

Dume oĝo Kaper daŭrigis sian ĉirkaŭiradon, trairante diligente la vilaĝon en la **ankoraŭ-ne-aŭroro**...

*William Auld, el la angla, Belarto, 1961, aŭtuno, p. 2*

## **APENAŬ**

**Apenaŭrideto**, **apenaŭaŭdebla** voĉo.

*El kolekto de Klara Ilutoviĉ, Moskvio, Elektrostalj, ricevita marte 1998*

## **APUD**

En septembro 2004 okazis staĝo pri “**apudbeletro**” en la Esperanto-centro Kvinpetalo en Bouresse, Francio.

*Claude Gerlat, or., La Gazeto, 116 (jan. 2005), p. 17*

Longe SAT estis la sola grava kontraŭforto de UEA, aŭ ĉu pli bone diri **apudforto**, ĉar diference de la poresperanta UEA, ĝi ĉiam ŝatis emfazi sian peresperantecon.

*Komitatano Z, or., La Ondo de Esperanto, 2003, 3, p. 10*

Bays, instruisto loĝanta en fora regiono de suda Brazilo, en 1977 **apudprofesie** komencis prezinde kompostadi por E-eldonejoj.

*Stefan Maul, or., Germanio, Esperanto, 1996, 1, p. 9*

Iniciatis ĝin la kanadaj lingvistoj Rajendra Singh kaj Alan Ford; **apudlaboris** kun ili la usona lingvisto Stanley Starosta...

*Probal Daşgupto, or., Hindio, La Ondo de Esperanto, 2005, 6, p. 13*

## **BALDAŬ**

Rompinte la elektron, ambaŭ iris al la larĝa fenestro, kiun li duflanke malfermis. Blovo de **baldaŭmatena** aero surprizis ilin pro sia neatendita malvarmeto.

*Lorjak, or., Francio, Iluzioj, HEA, Budapeŝto, 1982, p. 79*

## **ĈE**

Se ankoraŭ **ĉeus** tiaj instruistoj.

*Literatura Foiro, 143 (jun. 1993), p. 139*

La romano bone emfazas ke la varmego furiozigas ĉiujn sensojn: ĉefe odoroj iĝas pli **ĉeantaj**, pli potencaj...

*Madelaine de Zilah, or., Francio, La Gazeto, 12 (okt. 1987), p. 10*

Post gekuna nokt' de dormo,  
ekmateniĝas nun; sufloras  
al ŝia subzonoj', **ĉekuŝa** man'

mentora.

*Christian Declerk, or., Literatura Foiro, 142 (apr. 1993), p. 100*

La sekvantajn tagojn, najbaroj festosalute **ĉepasadas** unuj la aliajn, sidante momenton, tetrinkante kaj manĝetante.

*Mao Zifu, or., Ĉinio, La Gazeto, 69 (mart. 1997), p. 23*

... Vin mi ekkonas

kaj posedas

ekde l' unua krepalpito,

ĉar

neniu solas, kiam vi ĉeestas,

neniu fremdas, kiam vi **ĉestaras**,

neniu mortas, kiam vi **ĉeflankas**.

*Nicolino Rossi, or., Italio, Literatura Foiro, 169 (okt. 1997), p. 234*

La simbolo kaj emocie grava jaro 2000, **ĉesoĵla** al nova miljaro, donas al multaj homoj...

*Kep Enderby, or., Aŭstralio, Esperanto, 2000, 1, p. 1*

Mia indiko de la urĝeco de la situacio, dramece substrekitaj en la sama numero de *Budapeŝta Informilo*; **ĉe-metita** en la revuo estis la nigre borderita sciigo pri la morto de Paŭlo Balkanyi...

*Bernard Golden, or., Usono – Hungario, Heroldo de Esperanto, 1981, 2, p. 3*

Gaetan, trafite de la genieta ideo, senbrue sekvis ilin kiel eble plej **ĉee**...

*Lorjak, or., Francio, Retoj, eld. Fondumo Esperanto-Säätiö, Finnlando, 1978, p. 99*

Se ĉiĵoje via studo ne povus ne ĉesi, ne priplendus nin nekapablaj gepatroj. **Ĉee** mi plorsingultis sen vorto.

*Mao Zifu, el la ĉina, Riveroj, 1998, 22, p. 2*

Ŝi sciis ke per tiu faro ŝia vivo ekestus daŭrado sen senco. Tial ankaŭ nun ŝi restos, preparos festenon... aŭ fariĝos birdo. “Fariĝi birdo!” **ĉehaltas** ŝia penso...

*Roger Imbert, el la kroata, Moderna Kroata Prozo, Zagreb, 1979, p. 576*

Mi povas diri ke EPĈ estas la unua E-revujo, kiun mi legis kun intereso kaj pasio, ĉar ĝi estas ne nur belaspekta, sed ankaŭ enhavoriĉa. Kion mi povas skribi pri tiu revuo, kiu estas mia **ĉekusena** legaĵo de 42 jaroj?

*Dang Dinh Dam, or., Vjetnamio, El Popola Ĉinio, 2000, 11, p. 11*

### ĈIE

La virino sidas en profunda mola fotelo, en la loko de sia kutima posttagmeza dormetado, tamen la **ĉieesta** bruoj ne permesas al ŝi ripozi...

*Zofia Mirska, or., Pollando, La Ondo de Esperanto, 1998, 12, p. 10*

Historio romantika, kruela, glora kaj malsentema estas **ĉieĉeestaj** en Rijeka.

*Snežana Bokulić, or., Kroatio, Heroldo de Esperanto, 1998, 4-5, p. 3*

### ĈIES

Ha, ha, tre amuza la eraro en la verkolistoj de Cherpillod per la **ĉies-buŝa** ‘*orthographe*’. Mi memoras tamen lingvisto-proverbon: “Hodiaŭ eraro... kaj morgaŭ normo”.

*Antonio Valen, or., Hispanio, La Gazeto, 131 (jun. 2007), p. 7*

### ĈIU

Kiamaniere la esperantista **ĉiutagulo** komprenu la poemojn de Mao Zifu...

*Nicolino Rossi, or., Italio, Monato, 1998, 5, p. 7*

En mi sidas du mioj – unu la ruslingva, la alia ĉies aŭ pliĝuste **ĉiuj-lingva**. Nome tiu ĉiuj-lingva ĉiam pli kaj pli riĉiĝas.

*Anatolo Gonĉarov, or., Rusio, Fonto, 255 (3, 2002), p. 27*

En parto de sekundo ĝi fariĝis **kielĉiuj**a homo, dolorkapabla kaj kria.

*Lorjak, or., Francio, Retoj, eld. Fondumo Esperanto-Säätiö, Finnlando, 1978, p. 11*

### ĈIAM

... ne timante eblajn protestojn de **ĉiam-kritikantoj**...

*Erich-Dieter Krause, or., Germanio, Heroldo de Esperanto, 1996, 14, p. 4*

Kiel menciite, Fortalezo estas **ĉiamsomera** apudmara urbo, kiu estas unu el la plej turismaj en Brazilo.

*Ŝigeki Maeda, el la japana, Oomoto, 445 (jul.-dec. 2000), p. 23*

Persone mi plej ĝuis la aperojn de Ĵak Le Puil (nova KEF-stelo), Ĵomart kaj Nataŝa

(bisaj steloj) kaj la roka aglomeraĵo Persone/Amplifiki (**ĉiamverda**j pra-steloj).

*Sten Johansson, or., Svedio, Esperanto, 1993, 11, p. 190*

Tamen ĉar la knabinoj estis same neregeblaj kiel li, liaj venkoj ĉiam montriĝis efemeraj, kaj dum kelkaj jaroj li troviĝis en **ĉiamrea**j malkonsentoj kaj disputaĉoj.

*George Saville, el la angla, Norda Prismo, 1956, 4-5, p. 204*

En ĝi [en Esperanto] apudas unu la alian pragmatuloj kaj idealistoj, lingvemuloj kaj plifeliĉigantoj, ĝisostuloj kaj dikhaŭtuloj, “**ĉiampravuloj**, / pioniroj...

*Istvan Ertl, or., Hungario – Nederlando, Esperanto, 1999, 3, p. 41*

Sed la rakonto havas gravan humanisman mesaĝon, kiu estas ĉiamvalida: Ne malbontraktu, ne persekutu!

*Baldur Ragnarsson, or., Islando, Esperanto, 2006, 3, p. 62*

Poste, simile al mi, vian menson invados la demando: kia ŝildo taŭgas al la **ĉiam-testudada** esperanta legio?

*Eugene de Zilah, or., Hungario – Francio, La Gazeto, 86 (jan. 2000), p. 3*

Mi retrovas **ĉiamplue** memidentajn, la pretekstojn donitajn de la franca registaro por bari la vojon de nia lingvo al lernejo.

*Eugene de Zilah, or., Hungario – Francio, La Gazeto, 78 (1998), p. 3*

Kaj nun mi diras al vi, ke per viaj poemoj vi **ĉiamdaŭre** vivos, ĉar vin legos homoj, kiuj ankoraŭ ne naskiĝis.

*Juan Régulo Perez, Hispanio, Riveroj, 1993, 1, p. 18*

**Ĉiamverda** armeo.

**Ĉiamsilentaj** maljunaj plugbovinoj.

**Ĉiamekzista** universo.

*El kolekto de Klara Ilutoviĉ, Moskvio, Elektrostalj, ricevita marte 1998*

La antikva pagana kredo estis por liatempaj islandanoj vualita per nebuloj de la pasintaj jarcentoj kaj eĉ la paganaj dioj jam estis kiel demonoj por la **tiamuloj**.

*Sigurdur H. Pétursson, or., Islando, La Gazeto, 131 (jun. 2007), p. 13*

Kial li scias tiom da **neniamestintaj** historioj, dum aliuloj eĉ unu ne scipovas elpensi?

*István Nemere, or., Hungario, Heroldo de Esperanto, 2006, 1, p. 3*

– Ĉu mi povas i... amen, jes ja, **iamen**, vojaĝi per la maŝino de Wells? Antaŭe mi...

– Konsentite. Diru nur: **kiamen**?

*Georgo Kamaĉo, or., Hispanio, Literatura Foiro, 118 (apr. 1989), p. 15*

## ĈIO

Intertempe la malmultajn fenestrojn, kiujn oni malfermis por vidi la kverelon... la virinoj alfenestrigintaj estis ĉiuj similaj, ĉar la komuna sento de **ĉioa** sensenco presis sur ilin tiun neŭtran aspekton, videblan ĉe fiŝoj aŭ ĉe ĵus-mortintoj.

*António De Macedo, or., La Kancerkliniko, 87 (jul.-sep. 1998), p. 11*

La eternaj optimistoj, instigantoj por “kreo de laboro”, opinias, ke ekzistas la **ĉio-**

**solvaj** servoj, tamen...

*Gilbert Ledon, or., Brazilo, Monato, 1999, 3, p. 5*

La infano ekploris. Ŝi prenis la graŭlulon sinen, kaj komencis **ĉio-vorti** pri kapreolinoj kiuj ĵusaperis sur arbara klarejo, kelkajn metrojn sub la tempomaŝino.

*Jovan Zarkoviĉ, el la serba, D.Mikuliĉiĉ, "O" kaj aliaj rakontoj, Zagreb, 1988, p. 116*

Eĉ la okono de la loĝantaro kiu ne havas laboron estas bone prizorgata. Ŝtato **ĉio-inkluziva** estas rigardata kiel kriteria garantianto de tiu prospero.

*SAT-ano J.C.R., Sennaciulo, 1998, 5, p. 56*

## ĈIOM

**Ĉiomgravaj** faktoj.

*El kolekto de Klara Ilutoviĉ, Moskvio, Elektrostalj, ricevita marte 1998*

La unuaj dokumentoj kongresaj difinas:

a) **kioj** estas la esperantismo kaj la esperantisto...

*Sándor Revész, or., Hungario, Literatura Foiro, 95 (feb. 1986), p. 21*

## ĈIRKAŬ

Lin tro frue, for de l' hejmo, ili tie ĉi sepultis

Dum ankoraŭ junaj bukloj al li blonde **ĉirkaŭŝultris**.

*Willy Nüesch, el la germana, Fonto, 244 (4, 2001), p. 7*

La negro denove ordonis. Nur tiam li povis apenaŭ **ĉirkaŭokuli**.

*Miyamoto Masao, or., Japanio, Naskitaj sur la ruino Okinava, Librejo Pirato, Japanio, 1976*

Tuj soldatoj **ĉirkaŭkordonis** la instituton. Ni jam eĉ ne rajtis veturi hejmen.

*I.Nemere, or., Hungario, en Sferoj. Sciencfikcio kaj fantasto, 1984, Eld.Grupo Nifo, Hispanio*

Komence du el la tri lingvistoj tute ne kuraĝis antaŭ Eco [Umberto] rekte alfronti la temon de Esperanto kaj de internaciaj lingvoj en la praktiko, kaj ili klere **ĉirkaŭparolis** pri Lejbnico kaj pri lingvaj malplimultoj, pri la aliaj romanoj de Eco kaj...

*Renato Corsetti, or., Italio, Esperanto, 1993, 11, p. 181*

– Nenial mi koleros – asertis Don Quijote. – Vi povas paroli libere, Sancho, sen ia **ĉirkaŭfrazo**.

*Fernando de Diego, el la hispana, La inĝenia hidalgo Don Quijote de la Mancha, eld. Fundacion de Esperanto, Hispanio, 1977, p. 407*

... nigre vestitaj viroj kaj knaboj, kiuj rapidas al la sinagogo...

la **ĉirkaŭhasto** de la homoj, kiuj iras al siaj ĉiutagaj aferoj...

*Josef Šemer, or., Esperanto, 2000, 2, p. 23*

Neniu vort' la bildon **ĉirkaŭrondas**

Donunta sencon, klaron al mistero.

*Willy Nüesch, el la germana, Fonto, 212 (aŭg. 1998)*



## Ĉirkaŭkomi

Anatolo Gonĉarov, or., iam dum parolo.

## ĈU

La juĝisto rigardas **ĉue** al Fanoro, kiu demandis...

*István Ertl, Corrado Tavanti, Hungario – Italio, Tiu Toskana septembro, HEA, Budapest, 1990, p. 131*

“Ĉu ne krimo estas pli probabla?” – la policano **ĉuis**, kun akuta atento al la vizaĝesprimo de la alia.

*Johán Valano, or., Ĉu li bremsis sufiĉe? Antverpeno – La Laguna, TK-Stafeto, 1979, p. 21*

– Mi estas Selna. Ĉu mi rajtas? – ŝi **ĉuis**, almontrante vakan seĝon ĉe lia tablo.  
*Miguel Fernández Martín, or., Literatura Foiro, 142 (apr. 1993), p. 71*

Al li premas ŝi harojn, brakkovras

lin pensan, lin **ĉuas**: Kielas?

Liabrusten vizaĝon ŝi ŝovas

konfuza kaj diras: Tielas?

*Nicolino Rossi, or., Italio, Literatura Foiro, 162 (aŭg. 1996), p. 203*

Laŭleĝe de la frontpaĝo iom da **ĉueco** signas la nelacigeblan scivolemon en nia disporo.

*Madeleine de Zilah, or., Francio, La Gazeto, 50 (jan. 1994), p. 2*

Young Alexander parolas, “Saluto, ĉi lok”

“Young Alexander, **ĉuja**?” diras Larsen.

Young Alexander ne respondas.

Li apud arbo sin deseligas ...

*K.Jakobo, el la angla, La Gazeto, 33 (mar. 1991), p. 26*

Rosario... levis la kapon kaj trankvila, almenaŭ ekstere, **ĉuis**:

– Kial vi demandas?...

*Fernando de Diego, el la hispana, Camilo José Cela, La familio de Pascual Duarte, Barcelona E-grupo, p. 119*

Vivis la gepatroj tute kviete

kaj ritme fidinte sen tro da **zorg-ĉu**?

*Gerrit Berveling, or., Nederlando, Fonto, 137, p. 4*

Batali por mem batalo,

Sunflugi por certa falo

Konstrui por mem procezo,

Kurbiĝi sub estra pezo,

Prikraĉi je ĉiu kromo,

Rargasti en propra domo

Komenci per **ĉu-plenumo**,

Potenci en kurta dumo.

*Ivan S.Naumov, or., Rusio, Monato, 1999, 4, p. 22*

Post lego de la supra Jovan traduko, mi nenie plu tra la E-legitaĵoj renkontis **ĉu-vortojn** similaj al “ĉuvivaj” kaj “ĉukaŝitaj” proponitaj de Zarkoviĉ. Sed mi mem komencis uzi **ĉu-vortojn** en miaj leteroj.

*Anatolo Gonĉarov, or., Rusio, La Gazeto, 77 (jun. 1998), p. 6*

Per tio mi konstatis permeson verki tiun ĉi artikoleon por provoki pli oftan uzon de **ĉu-prefikso**.

*Anatolo Gonĉarov, or., Rusio, La Gazeto, 77 (jun. 1998), p. 6*

Sed nun, jen, estas trovitaj kelkcent **ĉuvivaj** homoj, kun korpoj kaj cerboj: sed la korpoj ne estas robotoj.

*Jovan Zarkoviĉ, el la serba, D.Mikuliĉiĉ, “O” kaj aliaj rakontoj, Zagreb, 1988, p. 120*

Eble ĉi tie troviĝas la respondoj al la unuaj demandoj, **ĉukaŝitaj** ĝuste en tiuj kosmaj radieroj kiujn predas li kaj lia istaro.

*Jovan Zarkoviĉ, el la serba, D.Mikuliĉiĉ, “O” kaj aliaj rakontoj, Zagreb, 1988, p. 30*

Al ŝia hejmo

ĝissojle li mensas pri

**Ĉu-kuna** dormo...

*Christian Riviére, or., Francio, Literatura Foiro, 225 (feb. 2007), p. 41*

En la senhoma parko krepuskiĝis. De la mara flanko mi rimarkis alvenantan homfiguron. “Ĉu viro, ĉu virino” divenumis mi, preparante kioma-hor-demandon. Subite la **ĉuviro** iras flanken.

*Anatolo Gonĉarov, or., Rusio, La Gazeto, 77 (jun. 1998), p. 6*

Ĉiamas en la viv’ konflikto

Pri **ĉuekzisto** de postmorto

Jen – iu diras ke ekzistas...

*Grigorio Arosjev, or., Rusio, Scienco kaj Kulturo, 1998, 4, p. 34*

Dum mia 42-jara esperantisteco mi fondis ses Esperanto-klubojn. Observante ilian sorton kaj tiun de aliaj E-kluboj, aperis iuj meditoj kaj **ĉuleĝo** de l’ Esperanto-movado.

*Anatolo Gonĉarov, or., Rusio, La Gazeto, 96 (okt. 2001), p. 6*

Aperas artikoloj kie venengalo gutas por primoki feblon de espa kulturo. Aperas **ĉuseriozaj** studoj pri neakcepteble de esperanto en Azio – Afriko. Aperas eseoj...

*Mikaelo Bronŝtejn, or., Rusio, REGo, 2001, 1, p. 4*

Nur la diskuto pri **ĉuelekto** de la vicprezidanto(j) okazis iom arde kaj emocie.

*Garik Kokolija, or., Rusio, REGo, 2004, 2, p. 1*

Pri **ĉukompreno** kaj aŭkorekto.

*Mikaelo Bronŝtejn, or., Rusio, REGo, 2003, 5/6, p. 53*


*elnotis Anatolo Gonĉarov (Krasnojarsk)*

# MUSLIM MAGOMAJEV KAJ ESPERANTO

*omaĝe al la 70-jara jubileo de la fama kantisto*

Dum mia jam longa E-vivo mi plurfoje povis konstati, ke paralele kun ni – enmovadaj esperantistoj, pli-malpli konantaj kaj kontaktantaj unu la alian, – ĉiam ekzistis tiel nomeblaj “esperantistoj por si mem”. Lerninte la lingvon ĉu memstare (lastatempe tiajn kazojn plioftigis Interreto), ĉu dank’ al iu same izolita E-isto, ili plej ofte restas nekonataj. Fojfoje tiaj personoj eĉ montras sin en la E-medio, sed (krom raraj esceptoj) restas en ĝi nelonge kaj revenas al sia (f)ermita esperantumado.

Tamen estis ankaŭ tiuj, kiuj, konservinte la E-scion ĝis la vivofino, neniam kontaktis “tradiciajn” esperantistojn, eventuale eĉ ne konjektante pri tia ebleco. Do nur hazarde ni povas ekscii pri unuopaj tiaj kazoj. Kaj se temas pri persono vaste konata, tio jam certe prezentas publikan intereson.



Antaŭnelonge mi konversaciis kun moskva muzikreĝisorino Anna Putjatina. La interparolo fluis ĉirkaŭ la proksimiĝanta jubileo de Muslim Magomajev, kiun ŝi bone konis persone. Rakontante pri sia kontribuo al koncernaj aranĝoj, Anna subite rememoris pri mia esperantisteco kaj demandis: “Cetere, ĉu vi aŭdis ke Muslim sciis Esperanton?” Je mia mirego: “Ĉu vere??” ŝi konfirmis: “Jes, efektive! Ni eĉ retkorespondis pri tio”. Mi tuj interesiĝis, ĉu tiu korespondo konserviĝis kaj se jes, ĉu eblus ĝin legi. Anna certigis ke jes, kaj baldaŭ mi ricevis ne nur la celatan tekston, sed eĉ la afablan permeson publikigi ĝin.

La korespondon kaŭzis demando de Anna al Magomajev, ĉu li scias la lingvojn, en kiuj li kantis. Muslim respondis, ke ne ĉiujn, nomis la reale sciatajn kaj aldonis: “Kaj krome Esperanton”.

La temo estis daŭrigita per ĉi-sube citata ret-dialogo, okazinta la 21-an de majo 2008 dum duonhora daŭro dank’ al la tujmesaĝilo “Mail.ru Agent”. La replikoj de Muslim Magomajev estas grasliteraj, tiuj de Anna Putjatina – ordinarliteraj.

---

*Муслим, ты как-то сказал, что знаешь эсперанто. Когда ты выучил этот язык?*  
**В 70-м.**

*А откуда про него узнал?*

**От ВОЛЬФА ГРИГОРЬЕВИЧА.:-)**

*Мессинг знал эсперанто?????*

**ДА.**

*Ого!!!!!! И до сих пор ты помнишь этот язык? Можешь говорить, читать?*

**Не так хорошо, как раньше, но ИНТЕРНЕТЫ дают возможность повторить!:-)**

*В интернете есть материалы на эсперанто???? Не знала.....:-[*

*А кто-то ещё из твоих знакомых владеет этим языком?*

**КОНЕЧНО!:-)**

**ОЛЕГ АЛЕКСЕЕВИЧ, БОРЯ ОСКАРОВ, ЛЕОНИД МАЗУРКЕВИЧ.:-)))**

*Олег Алексеевич – это кто??*

**Один из моих учителей.:-)**

*Понятно!!! Скажи, а есть песни на эсперанто?*

**ДА.:-)**

*И ты мел?*

**НЕТ.:-)**

*Жаль..... А то я губки раскатала спросить, нет ли записи.....D*

*А почему не мел??*

**ЗАЧЕМ, да и “гоняли” за него!:-))**



*“Гоняли”? Он был запрещён?? А зачем – так интересно же!*

**НЕТ, он был неприят!:-)**

*Понятно..... Скажи, а Мессинг хорошо язык знал?*

**ДА.:-)**

*С его способностями...!!! => А тебе когда-нибудь пригодилось знание эсперанто?*

**НЕТ.**

*Жаль.....:-)*

*Значит, ты его выучил чисто для себя, из интереса?*

**ДА.:-)**

*Здорово!!! Кстати, ты обещал меня научить.....;=)*

**ДА.**

*Научишь?*

**ДА.**

*Спасибо!!:=)*

**(Resumo:** Muslim Magomajev lernis Esperanton en 1970, eksciinte pri ĝi de Volf Messing, kiu bone sciis la lingvon. Poste li refreŝigis siajn sciojn dank’ al Interreto. Pri E-kantoj Muslim estis informita, sed mem en Esperanto ne kantis, ĉar tio estis ne laŭmora. Li ne spertis utilecon de E-scio kaj lernis la lingvon pro nura intereso. Fine Muslim promesis instrui Esperanton al Anna.)

Laŭ la vortoj de Anna, post tio ŝi efektive ricevis de Muslim E-lecionojn – bedaŭrinde nur kelkajn komencajn, ĉar li estis jam grave malsana kaj post nelonge mortis.

Nun Anna Putjatina preparas muzikan festivalon je la nomo de Muslim Magomajev, okazontan ĉi-aŭguste (<http://www.fest-mag.narod.ru>). Ŝi esprimis deziron ke tie sonu ankaŭ vokalaĵoj en Esperanto. La kantontoj estas serĉataj.

**Viktor Arolovič (Moskvo)**



# Bulteno de REU

kompilas kaj redaktas Grigorij Arosev, redaktofino – la 14.07.2012.

## **Skize pri Volgia Esperantista Renkontiĝo**

Komence de julio apud Samara pasis la 15-a Volgia Esperanto-Renkontiĝo (VER-15). Ĝin partoprenis entute pli ol 40 personoj (kune kun infanoj). Estis reprezentantoj de 11 urboj. La programon konsistigis prelego pri la historio de Esperanto-movado en la urbo Samara (okaze de la 100-jariĝo de la movado), ronda tablo pri la kluba laboro, trejnado por KER-ekzameno, ekskurso en Toljatti kaj al la transa flanko de Volgo. Krome okazis kvizo, konkurso por vojaĝantoj, stafeto por infanoj, diversaj lekcioj k.a. Menciendas E-kurso por infanoj. Detala raporto aperos en la sekva numero. Sube vi trovos *Rekomendojn*, akceptitajn dum VER.

---

### **REKOMENDOJ**

*de la partoprenantoj de VER-15 (01-05.07.12, Toljatti) – reprezentantoj de 11 urboj – al la rusia esperantistaro*

1. Ĉiu E-klubo, grupo, tema E-movado ks rerigardu siajn celojn kaj taskojn konforme al la lokaj cirkonstancoj kaj nuntempeco, akceptu skriban dokumenton (Statuton, Mision, Regularon aŭ alian) kaj strebu konscie sekvi la akceptitan agadlinion.
2. Ĉiu rusia esperantisto aspiru plenumi la internacian KER-ekzamenon – deklare per tio sian konscion pri la neceso vere scii la lingvon, diligente lerni ĝin kaj senĉese pri ĝi perfektigi.
3. Ĉiu E-kolektivo zorge atentu historion de Esperanto en sia regiono, serĉu kaj studu arkivojn, kompilu biografiojn de rimarkindaj esperantistoj, kolektu rememorojn; la materialoj enmetendas sur unu interretpaĝaron, tie (kaj paralele en Vikipedio) ili akumuliĝu – ĝis kolektiĝos sufiĉe da materialoj por eldoni ilin libroforme kiel novan Enciklopedion de rusiaj esperantistoj.
4. Ĉiuj E-kolektivoj kaj unuopuloj aktive aliĝu al la popola



*kelkaj partoprenantoj de VER dum ekskurso*

*movado por la lingvaj rajtoj – la Lingvaj Festivaloj, komencante eĉ de etaj LF en lernejoj, bibliotekoj, kulturaj centroj, kaj de jaro al jaro kreskante – surbaze de la konscio, ke ne ekzistas nuntempe pli fekunda kampo por popularigo de Esperanto kaj pozitiva sinprezento antaŭ vasta ekstera publiko.*

*5. Ĉiuj interesigantoj kontribuu kolektadon de porinfanaj versaĵoj, ne nur publikigotaj en la kreota retpaĝaro, sed ankaŭ arte voĉlegataj, en la reto.*

*6. Esperantistoj de Samara regiono enkadre de VER-tipa E-renkontiĝo organizu en la jaro 2013 metodikan seminarion pri popularigo de Esperanto enkadre de grandaj neesperantistaj aranĝoj kaj okazigu dum la kant-festivalo “Gruŝin” vastan informkampanjon pri Esperanto.*

## **Jubilea E-kurso de ILEI nuligita**

Jam antaŭ unu jaro Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj (ILEI) anoncis, ke honore al la 125-jara jubileo de Esperanto aperos nova, 125-leciona kurso de Esperanto. Laŭplane ĝi devis esti lanĉita meze de aprilo 2012, kaj finaj ekzamenoj por dezirantoj estis planataj por la Universala Kongreso. Ankoraŭ en la februara numero de la revuo *Esperanto* la respondeculoj diskonigis la preparatan retan kurson, sed poste nenio okazis. Anstataŭe la tuta ideo nun estis silente entombigita.

La plano pri 125-parta reta kurso estis anoncita en aprilo 2011. Tiam la revuo *Esperanto* aperigis artikolon de la prezidanto de ILEI, Stefan MacGill kun la jena diskonigo:

“La defio, kiun ILEI akceptas, estas pretigi 125-partan kurson, bazante ĝin sur la unikaj bezonoj kaj trajtoj de Esperanto, kaj ne sklave sur alilingvaj skemoj, kio implicas, ke la kurso estu forte verbo-bazita. Kun tiom multaj partoj, ĉiu enhavos modestan kvanton da nova materialo.”

Laŭ la artikolo, la kursokomenco en diversaj landoj devus okazi en la 23-a de marto 2012. La kurso devus esti ĉefe reta, sed mezkursaj renkontiĝoj laŭ la plano povus okazi en la 25-a de majo, kaj ekzamenoj devus esti proponitaj kursofine.

“La projekto altiros atenton al Esperanto kaj ĝia jubileo. Ĉefe pro unueciga simbolo, samtempa lanĉo multlande, kune kun la nepra eblo ke kursanoj tra la reto (skribe, parole, bilde) komunikiĝu unu kun la alia dum la studado”, anoncis ILEI.

Nova artikolo pri la temo aperis en la revuo *Esperanto* en februaro 2012, jam sen precizaj datoj: “...ne atendente la aperon de la unuaj lecionoj, kiu tamen ne estas tre malproksima, vi jam komencu vidi tion, kio ekzistas aŭ ne ekzistas en via lingvo”, skribis Renato Corsetti kaj Stefan MacGill.

Tamen baldaŭ evidentiĝis, ke la disreklamita “Kurso 125” ne ekzistas, kaj ankaŭ ne ekzistos, almenaŭ ne dum la jubilea jaro. En komuniko publikigita en la retejo <Edukado.net> la 12-an de marto, Renato Corsetti subite rekomendas, ke ĉiu lando preparu propran kurson kun tiu nomo, kaj komprenigas, ke neniuj kurso de ILEI sub tiu nomo eĉ estis planita: “La ‘kurso 125’ havas ĉi tiun nomon, ĉar ĝi okazas en la jubilea jaro 125-a de Esperanto. Ĉiu ajn alia klarigo kiun iuj ligas al ĉi tiu nomo estas privata opinio.”

***La artikolo aperis en “Libera Folio”***



## **Reta intervjuo kun la germana esperantisto Brandenburg**

La 24-an de aprilo la ambasadoro de Germanio en Rusio, s-ro Ulrich Brandenburg respondis demandojn de legantoj de la populara retejo <[www.gazeta.ru](http://www.gazeta.ru)>. S-ro Brandenburg estas denaska esperantisto. Post kiam la novaĵo pri la intervjuo aperis en la dissendolisto <reu-agado>, oni konsentis, ke la intervjuo,

estas bona okazo iom reklami Esperanton. Oni decidis demandi s-ron ambasadoron iom pri Esperanto. Minimume unu demando estis sendita (probable pli), sed rezulte aperis eĉ ne unu. Kaŭzoj de tio povas esti du. La unua: la retejaj administrantoj, kiuj antaŭfiltras la demandojn, ne taksis la temon interesa por la konversacio kun s-ro Brandenburg. La dua: li mem ne volis tuŝi la temon, ja fine li konfesis, ke “mi legis ĉiujn demandojn”. La plena teksto de la intervjuo legeblas ĉi tie: <<http://www.gazeta.ru/interview/nm/s4588957.shtml>>.

## **Informo pri la 125-jariĝo de Esperanto en Belorusio**



La teksto de la gazetarkomuniko, kiun pretigis Rusia Esperantista Unio helpe de volontuloj, estas publikigita en la retejo de la ĵurnalo “Sovetskaja Belorussija” (alia titolo – “Belarus’ Segodnja”). La preciza adreso estas:

<<http://www.sb.by/post/129203>>. Oni aparte ĝojas pro tiu informo ĉar jam longan tempon en Belorusio forestas iu ajn organizita E-movado. Des pli multan dankon ni ŝuldas

al Andrej Kirienko el la urbo Gomel, kiu aranĝis la publikigon. Post la artikolo estas lasitaj du komentoj. Unu el ili enhavas dankon pro la informo kaj deziro vidi pliajn ĉi-temajn artikolojn. En la dua oni bedaŭras pri foresto de E-asocio aŭ E-klubo.

## **Forpasis Jevgenij Perevertajlo**

La 27-an de februaro 2012 en Taŝkento forpasis veterano de sovetia E-movado Jevgenij Sergejeviĉ Perevertajlo (naskiĝis en 1938). Li esperantistiĝis en 1957 kaj longan tempon gvidis E-movadon en Uzbekio, kie loĝis ĝis la morto. Perevertajlo estis instruisto, organizanto kaj tradukisto. Inter pluraj liaj atingoj estis traduko de la romaneto de Arkadij Gajdar “Timur kaj lia taĉmento” (eldonis Hungaria E-asocio en 1982), 11-lingva E-kurso en la revuo “Sovetskij Uzbekistan” (1988-1990), du lernolibroj de Esperanto kaj multo alia. Ĝis siaj lastaj tagoj li estis en Esperantujo – malpli ol du monatojn antaŭ la forpaso li partoprenis E-renkontiĝon en Apudmoskvo...



## REU-kotizoj por 2012

### **– mecenata kotizo: 500 rubloj**

*Inkluzivas ĉion de la individua kotizo (vd.sube), sed sur membrokarto estos skribita "Mecenato de REU".*

### **– individua kotizo ekde la 1-a de marto 2012: 250 rubloj (por eksterKŜŝanoj – 25 eŭroj).**

*Inkluzivas membrokarton, Jarlibron en elektronika formo (laŭpete – ankaŭ en la papera; la Jarlibro aperos komence de 2013), Bultenon de REU en elektronika formo (laŭpete – ankaŭ en la papera) kaj aliajn informojn de REU, voĉdonrajton dum Konferencoj de REU, rabatojn en E-aranĝoj de REU. La individua kotizo validas por la kalendara jaro 2012.*

*NB! Pagante jarkotizon antaŭ la 29-a de februaro vi ne nur helpas REU, sed ankaŭ ŝparas iom da propra mono. Se oni pagas la kotizon ne persone al kasisto, dato de la pago estas kontrolata laŭ la poŝtkvitanco.*

### **– dumviva kotizo: 5000 rubloj (por eksterKŜŝanoj – 500 eŭroj)**

*Inkluzivas ĉion de la individua kotizo dum tuta vivo de la membro.*

### **– familia kotizo: 100 rubloj**

*Inkluzivas membrokarton, voĉdonrajton dum REU-Konferencoj, rabatojn en E-aranĝoj de REU. Je familia kotizo rajtas parencoj de individuaj, dumvivaj aŭ mecenataj membroj, kiuj loĝas ĉe la sama adreso.*

### **– kolektiva kotizo: 70 rubloj por ĉiu aligita membro (aliĝintaj kolektivoj pagas min.por 5 membroj).**

*Inkluzivas po 1 ekzemplero de REGo kaj Jarlibro de REU por kluboj kun 10-15 aligitaj membroj (kaj por ĉiu aldona deko de aligitaj membroj), aliajn informojn de REU por kolektivo; membrokartojn, voĉdonrajtojn en Konferenco de REU, rabatojn en E-aranĝoj de REU. Se klubo pagas por malpli ol 10 membroj, ĝi devas aparte aboni REGon.*

### **– aliĝkotizo por novaj aŭ realiĝintaj kluboj – 300 rubloj.**

*Unufoje pagata de nova aliĝinta kolektivo. Jam aliĝintaj kolektivoj ne pagas. Nova kolektivo iĝas regiona organizaĵo de REU kaj laŭpete ricevas dokumenton pri tio. Se kolektivo ne pagas kotizojn por aligitaj membroj dum du sinsekvaj jaroj, ĝi poste devas denove aliĝi al REU.*

## Pagmanieroj

1. **Poŝta ĝiro:** 142717 Московская область, Ленинский район, п/о Развилка, до востребования, Наталье Николаевне Шороховой.
2. En **Yandex-Dengi** oni povas pagi al la monujo 41001612527392.
3. Pagi kotizon (post anticipa interkonsento) ankaŭ oni povas **personale en Moskvo**.
4. Tra **Sberbank**.

– Se vi havas propran bankan karton, emisiitan de Sberbank, vi povas ĝiri la monon rekte tra bankmaŝino (банкомат). Tiucele enigu karton, entajpu vian identigan kodon, kaj poste elektu en la menuo: "**Перевод средств**". Entajpu numeron

de la karto: 6761 9600 0012 682622 kaj necesan sumon.

– Se vi ne havas karton aŭ aŭtomata ĝiro ne sukcesis, vizitu bankon kaj transpagu la monon, uzante ĉi-subajn datumojn:

Банк получателя: ОАО "Сбербанк России"

БИК 044525225, ИНН 7707083893, КПП 775003035, ОКATO 45286580000, ДО № 0135, 121069, Москва, Поварская улица, 31/29.

Получатель: Шорохова Наталья Николаевна.

Номер счёта получателя: 40817 81003 82604 04119, код подразделения 9038/00135.

Bonvolu nepre konsideri, ke samtage kun la ĝiro vi devas retroŝte aŭ telefone informi nin pri via pago (pere de la adreso **membreco@reu.ru** aŭ telefonnumeroj de estraranoj). Vi devas informi pri la ĝirita sumo kaj nomo(j) de homo(j), por kiu(j) estas destinita la pago. Se vi ne informos nin, la mono estos konsiderata kiel anonima donaco por la kaso!

---

## FORPISIS PROF. D-RO OTTÓ HASZPRA

---

Honora Membro de UEA, prof. d-ro Ottó Haszpra (1928-2012) forpasis la 18-an de aprilo en Budapeŝto, kie li naskiĝis la 11-an de septembro 1928. Haszpra estis emerita profesoro de la hidrokonstrua katedro en la Teknika Universitato de Budapeŝto, eksperto de UN, kaj ekde 2004 membro de la Hungara Akademio de Sciencoj.

Haszpra lernis Esperanton en 1958. Li estis membro de Hungaria Esperanto-Asocio ekde 1962 kaj servis ĝin kiel komitatano (1965-1990), estrarano (1977-1990) kaj vicprezidanto (1981-1990). Li estis fakdelegito pri inĝenierado ekde 1972, komitatano de UEA (1980-1990) kaj estrarano de UEA pri faka agado (1986-1989). Haszpra estis redaktoro de *Sciencaj komunikaĵoj* (1974-1979) kaj gvidanto de Scienca Eldona Centro de UEA en Budapeŝto (1981-1985). En la 68-a UK en Budapeŝto (1983) li estis rektoro de la Internacia Kongresa Universitato. Li membris en AIS ekde 1986, en Internacia Scienca Akademio Comenius ekde 1997 kaj en Akademio de Esperanto ekde 2004.



Ottó Haszpra aperigis multajn sciencajn kaj popularsciencajn artikolojn en Esperanto kaj ofte prelegis. Li kunlaboris por la 6-lingva *Geodezia fakterminaro* (1976-1981) kaj por *Hungara-Esperanta meza vortaro* (1996). En 2000 aperis lia ampleksa Esperanto-lernolibro por hungaroj. Krom la historia trarigardo *Esperanto – lingvo de natursciencoj kaj tekniko 1887-1986* (1988), Haszpra aŭtoris i.a. la studojn *La vera kosto de la multlingveco* (1978), *Liter-ofteco en Esperantaj tekstoj* (2001), *La natura ŝarĝo de la lingvolernado kaj ties radikala malpliigo* (2002) kaj *Egalrajteco kaj ekonomieco en la internaciaj rilatoj* (2005).

**Gazetaraj Komunikoj de UEA**

# Eksciu, ke...

## VLADIVOSTOKAJ ESPERANTISTOJ DENOVE EN HARBIN

La vican viziton al la ĉefurbo de la Nordorienta Ĉinio vladivostokaj esperantistoj dediĉis al la 125-jariĝo de Esperanto kaj la 140-jariĝo de Fjodor Postnikov, fondinto de la unua E-societo en Fora oriento kaj Vladivostoko. 14 membroj de E-klubo “Pacifiko” partoprenis la kvaran Junularan Seminarion de Esperanto, kiu okazis la 19-20-an de majo 2012 en Hejlongĝjang-a Scienc-Teknika Instituto en Harbin. La Seminarion partoprenis entute 48 personoj: studentoj de la instituto kaj kelkaj esperantistoj aktivuloj el diversaj provincoj de Ĉinio.

Dank’ al granda laboro de profesorino Song Ping, la seminario okazis sur altaj teknika kaj kultura niveloj: estis invititaj kelkaj ensembloj de popolaj kantoj kaj dancoj, ĉiuj prelegoj estis akompanataj per komentoj kaj fotoj sur granda ekrano.

Dum interkona vespero ĉiuj partoprenantoj prezentis ne nur proprajn personajn informojn, sed demonstris siajn artajn kapablojn. Tre sukcesis danco “Ciganesko”, kiun plenumis vladivostoka studentino de Supera Popola Lernejo ĉe Federacia Universitato. Ankaŭ prezentis sian arton fama ĉina uŝu-isto Zhang Jiping, majstre plenumante “Dancon kun glavo”.



Prelego de Gennadij Ŝlepĉenko “Ĉina poeto Li Bai en poezio de Anna Aĥmatova” elvokis intereson ĉe fama ĉina esperantisto verkisto s-ro Shi Chengtai, kaj prelego de Lubovj Karpeta pri Supera Popolo Lernejo ankaŭ estis interesa por la ĉina publiko. Certe, inter la prelegoj en korto de la instituto estis organizita ĉinstila gimnastiko tajĝiĉuano sub gvido de Zhang Jiping (vidu la foton), kiu, necesas noti, tre bone posedas Esperanton.

Post la Seminario por la partoprenantoj oni organizis ekskurson al “Bieno de Volgo”, kie inter rus-stilaj konstruaĵoj, sub hela ĉielo, oni deklamis versaĵojn, kantis, dancis, kreante etoson de Esperanto kaj Amikeco, temo de la Seminario.

Poste okazis la komuna fotado kaj adiaŭo ĝis sekva renkontiĝo en majo 2013 dum la vica 5-a Junulara seminario de Esperanto.

*Aleksandr Titajev (Vladivistik)*



## EKSPOZICIO KAJ SIMPOZIO PRI LA TEMO “KONSTRUITAJ LINGVOJ POR LA GLOBALIZITA MONDO”

*Unu lingvo savon donos,  
se ĝi sonos tra la ter’...  
Tial sciu la homar’:  
Menade bal pŭki bal!*

Ĉi kanto-linioj aŭdiĝis en la vespero la 15-an de junion en la Princa Salono de Bavara Ŝtata Biblioteko. Ili devenas de la dua strofo de himno, kiun la biblioteka koruso prezentis okaze de la malfermo de la ekspozicio *Inter Utopio kaj Realo: Konstruitaj lingvoj por la globalizita mondo*. Oni kantis en la origina lingvo Volapŭk. Ĉi lingvo, inventita por la tutmonda komunikado fine de la 19-a jarcento, elirante de Suda Germanujo disvastiĝis tutmonde dum pli ol deko da jaroj, sed poste forgesiĝis. En Munkeno la Volapŭk-himno jam prezentiĝis antaŭ precize 125 jaroj: siatempe tie okazis la 2-a universala kongreso de Volapŭk.

Bavara Ŝtata Biblioteko tamen dediĉis sin al la temo *Konstruitaj lingvoj* ne por memori pri ĉi evento. Du aliaj datrevenoj inspiris al tio: en 2012 okazas la centa datreveno de la morto de prelado Johann Martin Schleyer (1831-1912), la aŭtoro de Volapŭk. Schleyer esperis simpligi la tutmondan komunikadon per Volapŭk kaj akceli la interkompreniĝon de la popoloj. Kun la sama celo en 1887 Lazaro Zamenhof (1859-1917) sub la pseŭdonimo “D-ro Esperanto” publikigis sian *Lingvo Internacia*. Ĉi lingvo – konatiĝinta kiel Esperanto – sekve fariĝas 125-jara en la nuna jaro. La samtempuloj nomis Volapŭk-on kaj Esperanton same kiel multajn aliajn projektojn ĉi-specajn “mond-helplingvoj”. La moderna lingvoscienco preferas la neŭtralan esprimon “planlingvo”.

Por okupiĝi pri la historio de planlingvoj pravan stimulon donis ankaŭ la konstato, ke la demando diskutita en la finiĝanta 19-a jarcento, kiel oni povas ebligi tutmondan interkompreniĝon senhegemonian, pacakcelan, temp- kaj kost-ekonomian, aktualas ankoraŭ hodiaŭ. Bavara Ŝtata Biblioteko spertis la bonan ŝancon, ke ĝi povas apogi sin sur tri kolektoj por selekti ekspoziciajn objektojn kaj formi laŭvide plaĉan ekspozicion pri temo iom abstrakta.

Kiel humanscienca biblioteko universala kun signifaj malnovaj stokoj ĝi disponas pri grava historia kaj aktuala literaturo pri temo. Por ekzemplo: ĝi posedas la stokojn de la Munkena Volapŭk-a Klubo. Ili ampleksas ne nur revuojn kaj lernolibrojn, sed ankaŭ etajn presaĵojn kiel enirbiletojn, menu-kartojn aŭ kolektojn de



gazeteltranĉoj pri Volapük-aranĝoj. Dank' al la perado de D-ro Hermann Holzbauer, la longjara direktoro de la universitata biblioteko (UB) Eichstätt, Irmi kaj Reinhard Haupenthal transdonis en 2006 al Bavara Ŝtata Biblioteko sian kolekton *Planlingvoj kaj Interlingvistiko* ampleksantan pli ol 10000 bibliografiajn unuojn. Pri ĉi unika kolekto aparte grava por la Volapük-esplorado, la iama estro de la akirsekcio de Vurtemberg Landa Biblioteko, D-ro Klaus Schreiber, atentigis la UB Eichstätt. Kvar jarojn poste la filoj de Hanns Martin Schleyer (1915-1977) donacis al Bavara Ŝtata Biblioteko la germanlingvan parton de la biblioteko de Johann Martin Schleyer kaj ties 23 taglibrojn.

En sia malferma parolado Ĝenerala Direktoro D-ro Rolf Griebel kore dankis al la donacintoj Irmi kaj Reinhard Haupenthal kiel ankaŭ al Jörg Schleyer, kiu reprezentis sian familion dum la solenaĵo, por iliaj grandanimaj donacioj. Same li aprecis la engaĝiĝon de D-ro Hermann Holzbauer.

Reinhard Haupenthal prezentis la festprelegon *Kio estas kaj kiu-cele oni okupiĝas pri interlingvistiko?*, en kiu unue li klarigis la historion de la termino “interlingvistiko”, poste skizis la esplorkampon kaj formulis sciencajn dezirindojn.

En la ekspozicio, dank' al la supre skizita elstara stoko-stato, povis prezentiĝi, por ekzemplo, la germana kaj la rusa versioj de la Unua Libro, larĝa paletro da Esperanto-vortaroj, -tradukoj kaj -originaloj. Dokumentoj pri Volapük-aranĝoj, Esperantaj kongreslibroj, Esperanto-insignoj kaj -afiŝoj ekspoziciigis kaj donas impreson pri la manifestiĝo de la vivo de Volapük-istoj kaj esperantistoj kaj pri tio, kian formon oni donis al la festotagoj. Por Munkeno kaj ties ĉirkaŭaĵo apartan intereson havas la historio de Parkurbo Esperanto planita en 1912/13 en la komunumo de Gräfelting. La Kolekto por Planlingvoj de Aŭstria Nacia Biblioteko kaj la komunumo Gräfelting ebligis la instalon de vitrino kun varbmaterialoj pri ĉi projekto. Kunlaborantoj el Bavara Landa Oficejo por Termezurado kaj Geoinformado disvolvis 3D-simulon montrantan kie nuntempe situus ĉi setlejo, kiel la tereno siatempe previdita por la setlejo uziĝis tiam kaj prikonstruiĝis hodiaŭ.

Kiel specon de laŭtema enkonduko la ekspozicio prezentas ekzemplojn de konstruitaj lingvoj el la 17-a jarcento. En tio du iniciatoj konsideriĝas. Unuflanke la koncepto organizi surbaze de latino kiel “Interlingua” skriban komunikadon per kodoj sen tio, ke la sendanto kaj la ricevanto nepre devus scii mem la lingvon de la alia. Krom tio, la celo pli vasta, inventi lingvon kiu povus aplikiĝi tutmonde tiel skribe kiel parole, kaj kiu, baziĝante sur principoj filozofiaj, estus kvalite pli bona ol la konataj lingvoj.

Por alirebligi la ekspozicion eĉ transregione, oni enretigis virtualan version, kiu montras ĉiujn ekspoziciajn objektojn. Per eluzo de la avantaĝoj de la digitala medio, ĉi tie krome prezentiĝas aŭdeksemploj en Volapük kaj Esperanto en formo teksta kaj kanta, same kiel intervjuo kun Irmi kaj Reinhard Haupenthal. Ĉi-lastata informas pri ties planlingva kolekto kaj ilia engaĝiĝo kiel eldonistino kaj tradukisto.

Por doni okazon science pritrakti la temojn starigitajn de la ekspozicio, Bavara Ŝtata Biblioteko la 15-an de junio 2012 aranĝis en Friedrich-von-Gärtner-Salono simpozion kiu kun pli ol 70 partoprenantoj renkontis viglan intereson. Okazis kvin prelegoj. La unuaj du estis dediĉitaj al la inventintoj de Volapük kaj Esperanto

resp. al la historia evoluo de iliaj lingvo-projektoj. Reinhard Haupenthal, fakulo sur la kampo volapukologio, kaj D-ro Ulrich Lins, Esperanto-historiisto, estis la prelegantoj. En la dua prelega bloko parolis Prof. Gerhard F. Strasser (Ŝtata Universitato de Pensilvanio / Universitato Ludwig Maximilian, Munkeno) kaj Prof. Heiner Eichner (Universitato de Vieno) pri la historio de la artefaritaj lingvoj de la mezepoko ĝis la 17-a jc resp. pri la lingvosciencia diskuto pri planlingvoj. Fine Kortega Konsilisto Mag. Herbert Mayer raportis pri la historio de la Kolekto por Planlingvoj kaj la Esperantomuzeo ĉe Aŭstria Nacia Biblioteko, ambaŭ sub lia gvido.

Ĉi referaĵoj kune kun tiu de Reinhard Haupenthal ĉe la malfermo de la ekspozicio pri interlingvistiko same kiel selekta bibliografio estas presitaj en akompana volumo de la ekspozicio. Videblas selekto de ekspoziciaj objektoj en 25-paĝa bildoparto.

*La komunikon disponigis: Bayerische Staatsbibliothek  
(Bavara Ŝtata Biblioteko; Ludwigstr. 16, 80539 München)  
Gazetaraj Komunikoj de UEA*

## DIPLOMOJ PRO FIDELA MEMBRECO

Ĉi-jare 18 esperantistoj ricevas diplomon pri 50-jara seninterrompa membreco en Universala Esperanto-Asocio. Krome, 22 aliaj ricevas diplomon kiel ateston, ke ili estas individuaj membroj de UEA de 40 jaroj. Tiun honorigon pro fidela membreco iniciatis estraranino Loes Demmendaal, kaj la unuaj diplomoj estis disdonitaj en la jaro 2009. La diplomoj estas subskribitaj de la Prezidanto de UEA, prof. Probal Dasgupta. Inkluzive de la ĉi-jaraj ricevantoj, ĝis nun 218 esperantistoj ricevis diplomon pri 50-jara kaj 264 pri 40-jara membreco en UEA.

*Gazetaraj Komunikoj de UEA*

## JARLIBRO 2012 APERIS

La simbolo de la 125-jariĝo de Esperanto ornamas titolpaĝon, kaj la kovrilo de la Unua Libro de Esperanto – la tradicion portretan paĝon en Jarlibro 2012 de UEA, kiu aperis la 13-an de junio. Ĝia antaŭparolo estas verkita de prof. Amri Wandel, kiu elstarigas la ĉefajn evoluojn en la kampo de scienca kaj faka agado, pri kiu li respondecas en la Estraro de UEA. Li precipe emfazas la gravecon de la aldono de Esperanto al la aŭtomata tradukilo de Google. *En la interreta epoko ĝi eble estas komparebla al la siatempa rekono de Esperanto de Unesko en 1954*, li konstatas.

Du trionoj de la 288-paĝa libro konsistas el la Delegita Reto, kun la adresoj de 1632 delegitoj en 100 landoj. Estas 53 ĉefdelegitoj, 916 lokaj delegitoj, 102 vicdelegitoj, 34 junularaj kaj 1243 fakaj delegitoj. Krome, en Brazilo estas 5 regionaj delegitoj. La fakdelegitoj reprezentas preskaŭ 800 fakojn.

En la unua parto, eldonita ankaŭ aparte kiel Gvidlibro 2012, aperas adresoj k.a. informoj pri la organoj, in-



stancoj kaj servoj de UEA kaj TEJO, pri landaj kaj fakaj asocioj, akademioj, edukaj kaj kulturaj instancoj, bibliotekoj, radioelsendoj kaj pri Esperanto en Interreto.

Fine de la Jarlibro troviĝas du rabatkuponoj de la Libroservo de UEA por tiuj, kiuj faras mendojn per papera poŝto. Por retaj mendoj ne necesas uzi la kuponon. Membroj kun Gvidlibro aŭ Jarlibro rajtas dufoje jare mendi librojn k.a. varojn kun rabato 10%. Membroj en pli altaj kotizkategorioj rajtas je rabato ĉe ĉiu mendo.

La Delegita Reto k.a. informoj de la Jarlibro estas konsultebaj ankaŭ rete por la individuaj membroj, kiuj registriĝas kiel uzantoj ĉe <reto.uea.org>. Tie eblas ankaŭ rekte kontakti tiujn delegitojn, kiuj havas retadreson; en la ĉi-jara Jarlibro ilia nombro estas 1321 (80,9%). Unuafoje kelkaj delegitoj anoncis retadreson en Jarlibro 1994. En 1996 unu el dek delegitoj (10,3%) havis retadreson, en 2001 preskaŭ duono (48%), en 2006 pli ol du trionoj (68,9%), kaj en 2010 jam kvar el kvin delegitoj (80,8%). Al parto de la individuaj membroj la reta versio de la Jarlibro sufiĉas kaj parto ne bezonas la presitan libron ekzemple pro tio, ke ankaŭ alia samfamiliaro estas membro de UEA. Fine de majo la membroj kun retadreso estis petitaj sciigi la CO en la kazo, ke ili ne bezonas la presitan libron. Sekve ĝi ne estis sendita al 305 membroj (6,8%).

*Gazetaraj Komunikoj de UEA*

## ESPERANTISTOJ EN RIO+20

La fama urbo Rio-de-Ĵaneiro en Brazilo gastigis la Konferencon de Unuiĝintaj Nacioj pri Daŭripova Evoluo, Rio+20, okazintan de la 13-a ĝis la 22-a de junio. Ŝtatestroj kaj aliaj politikistoj el 193 membroŝtatoj de UN kaj reprezentantoj de la civila socio kunvenis en la kongresejo Riocentro. La nomo Rio+20 referencas al la unua tia konferenco en Rio-de-Ĵaneiro en 1992.

Samtempe okazis Kupolo de la Popoloj, kie renkontiĝas miloj da NRO-representantoj por observi la laborojn de la registaraj reprezentantoj kaj por komune ellabori proprajn proponojn surbaze de spertoj konkretaj kaj ne nur teoriaj. Temas pri vera festivalo de la homaro, kie en la vestaĵoj de sudamerikaj indiĝenoj, afrikaj triboj k.a. oni vidas la buntecon kaj la diversecon de la popoloj. Inter 500 paralelaj eventoj en Riocentro kaj en la Kupolo de la Popoloj ankaŭ teamo de dudeko da esperantistoj realigas diversajn aktivajojn.

La jam fama temo de UN *La estonteco kiun ni deziras* inspiris la mondan komunumon prezenti siajn sugestojn. La nia estas *La lingvo kiun ni deziras*. Aktivaj gejunuloj portis helverdan ĉemizon, kiu proklamis fronte en la angla *Esperanto – the language we want* kaj dorse en Esperanto *Ni volas tiun lingvon* kun la adreso de la retejo [www.lernu.net](http://www.lernu.net).

Miloj da NROj prezentis proponojn por prelegi pri neimagebla kvanto da temoj. UEA kun TEJO kaj la vegetarana asocio TEVA sukcesis fari tri prezentojn (po 30 minutoj) pri la temo *Dauripovaj konkretaj proponoj por nova estonteco*. Prelegis d-ro Francisco Wechsler, la ĵurnalisto Renata Ventura kaj Ursula Grattapaglia.



Dum la daŭro de la evento ĉiuj ses reprezentantoj de UEA, akredititaj ĉe UN, frekventis diverstemajn prelegojn, ĉe kiuj oni ofte debatis en pluraj lingvoj kaj la lingva problemo do estas evidenta. Paralele, en la Kupolo, grupo da junuloj prelegis en tendoj, dialogis kun centoj da interesatoj pri daŭripova lingvo kaj lingvaj rajtoj kaj intervenis en liberaj debatoj.

Alvaro Motta kaj Rafael Zerbetto partoprenis aktive la junularan konferencon *Youth BLAST*, kie ili havis kelkajn bonajn okazojn por reliefigi la lingvan situacion kaj la proponon de UEA. Entute 200 gejunuloj el la tuta mondo sendis 2-minutan videon pri la temo *La estonteco kiun ni deziras*. Inter la gajnintoj, po 3 el ĉiu kontinento, Rafael Zerbetto estas unu el la tri amerikanoj. Li estis plurfoje invitita prezenti sin antaŭ gravuloj. En sia filmo pri la naturkatastrofo en Amazonio li parolis en Esperanto kun angla subteksto. *Vere revolucio! Ĉiuj aliaj obeeme parolas nur en la angla*, diris Ursula Grattapaglia pri la filmo.

***Gazetaraj Komunikoj de UEA***

## **1000 MESAĜOJ DE LA URAL-SIBERIA DISSENDOLISTO**

La Ural-Siberia dissendolisto, kiu servas al esperantistoj en tre vasta rusia teritorio de Uralo ĝis la Orienta Siberio, estas atingonta baldaŭ sian unuan rimarkindan mejloŝtonon – milan mesaĝon ekde ĝia ekfunkcio. En la lastaj jardekoj firme enradikiĝis nova tendenco de interesperantistaj kontaktoj, kiu fontas el teknikaj ebloj de la informaci-komunikaj teknologioj, t.e kontaktoj ĉiam pli kaj pli malobeantaj tradiciajn organizajn formojn, sen kiuj, ekzemple, apenaŭ estus imagebla aktive kaj sukcese evoluanta esperantista movado en la dudeka jarcento.

Tiaspecan ambician projekton pri struktue ekvilibrita organizaĵo per la fono de Urala Esperantista Societo en 1988 praktike realigis iniciatemaj kaj lertaj organizantoj Aleksander Korĵenkov kaj Halina Gorecka. Urala Esperantista Societo, kies unua prezidanto estis Viktor Kloĉkov, efike funkciis kaj per sia ekzisto kaj plurdirekta agado defiis tiutempe kontraŭ la burokrata praktiko de ASE. La tutan spektron de ĝiaj aktivecoj regule prezentis sur siaj paĝoj la populara paperkajera “Ekzakte” – Informletero de uralaj esperantistoj. Sed post la transloĝiĝo somere de 2001 en la foran Kaliningradon de ambaŭ ĉefaj iniciatoroj kaj direktoraj figuroj UES rapide perdis sian avangardan elanon. Ekzistis pluraj evidentaj kaj latentaj kaŭzoj por ĝia estingiĝo, sed plej damaĝa el inter tiuj estis malkapablo de la disĉiploj pluporti la standardon sur la atingita nivelo, samhierarkie daŭrigi laboron sur la plugita kampo kaj adapti ĝin al novaj kondiĉoj.

Post la retiriĝo de UES el la regula tutregiona aktivado ĝia agadspaco ne longe restis vaka, kaj iom post iom ĝin plenigis novaj kunagadaj formoj, cetero sen strikte



formala kaj ordinara strukturiĝo. Unu el la premisaj pledoj por rapida renovigo de la agado sur nova kampo estis precize retkontaktoj, unuavice amikaj kontaktoj, unuigintaj homojn el diversaj urboj de la vastega Ural-Siberia regiono kaj sentrude mobilizintaj ilin al libervole kaj komune realigataj projektoj: EsPrimo – printempaj jarkunvenoj kun interesaj lingvaj kaj kulturaj programoj, tradiciaj semajnfinoj, interurbaj renkontiĝoj, literaturaj konkursoj, seminarioj kaj ekzamenoj ktp.

Nuntempe la tuta agado efektiviĝas sur kluba kaj individua niveloj. La interurbajn kontaktojn motoras aktivuloj, kiuj ne pretendas gvidore pintumi en la prezidio de iu societa korpo, kaj krome pluraj aktivantaj esperantistoj individue aŭ aligite membras en REU, kiu tegmentas landskale, pli aŭ malpli sukcese unuigas rusan esperantistaron sur la fundamento sendeviga kaj reciproke apoga, sen burokrataj intervenoj kaj premoj. Neniu dume povas esti plene certa, ke ĉi tiu agadformo estas nepre pli sukcesa ol la rutina kaj tradicie elprovita. Miaopinie ĝi evidentiĝas ankaŭ trajtojn malavantaĝajn, ĉar ĝi apogas sin ĉefe al la entuziasmo de unuopuloj, kiu, kiel pruvas la vivo, ne povas esti kontinue fekunda. Sed praktike ĉi tiu agadma-



niero funkcias ne malbone.

Posedanto de la paĝaro “Ural-Siberia esperantista movado” estas Pavel Veselov (Tjumenj), kiu teknike priservas ĝin kaj ankaŭ fincas ĝin kiel privata paganto al gastiga retejo. Ekde la komenco lin apogas

kaj daŭre aktive kunlaboras kun li kiel lingvaj asistantoj, monsubtenantoj, afiŝantoj kaj enpaĝigantoj de ofertataj tekstaj kaj fotaj materialoj Viktor Kudrjavcev (Jekaterinburg) kaj Galina Terentjeva (Ĉeljabinsk). La paĝaro havas rektan ligilon sur la ĉefpaĝo de REU, dank’ al kiu ĝin plu vizitas multaj scivolaj retkrozantoj. Decido pri la lanĉo de senpaga dissendolisto enkadre de la popularaj guglo-retgrupoj estis akceptita de aktivula kunveno en Toboljsk dum EsPrimo-3 en 2006. La dissendoliston, teknike prizorgatan ankaŭ de Pavel, abonas nun diverskategorie 66 personoj (registrita stato en marto 2012), inter ili oni povas trovi ankaŭ kelkajn abonantojn el aliregionaj urboj de Rusio. Plej multe mesaĝas esperantistoj el Jekaterinburg kaj Ĉeljabinsk, ilia oferta kvoto konsistigas 30% de la tuta informostoko. El inter la eksterregionaj gelistanoj oni povas danki al Svetlana Smetanina (Moskvo) por ŝiaj regulaj reagoj kaj informaj mesaĝoj.

Entute al la dissendolisto kontribuas pli ofte esperantistoj el uralaj urboj, malpli regule ofertas novaĵojn niaj kolegoj el la okcidentsiberia parto de la regiono. La dissendolisto estas regionskala informilo kaj esence similas reĵurnalon, en kiu



aperas diversspecaj mesaĝoj: anoncoj, urĝaj sciigoj kaj informoj, gratulmesaĝoj, diskutreplikoj, invitletoj, mallongaj rakontoj kaj tekstoj pri interesaj eventoj, retligiloj, iufoje ankaŭ fotoj ktp. Gravas, ke ĉiu abonanto de la dissendolisto rajtas sencenzure mesaĝi, sed malgraŭ tia aperta kaj demokratieca informperado la listanoj ne suferas pro skandaloj, senbezonaĵoj, distordoj kaj interpersonaj kvereloj, kiuj povus malstabiligi la ekzistantan ekvilibron kaj reciproke fidon.

La unuaj ses jaroj rapide pasis, kaj la Ural-Siberia senredaktora reĵurnalo kiel nemalhavebla informa fonto akurate kaj jam rutine servas al esperantistoj por amikaj kontaktoj kaj komunaj aferoj. Oni rapide kutimiĝas al bona retservo, sed malantaŭ ĝi apoge kaj neindiferente diligentas pluraj homoj el multaj urboj. Ili ĉiuj meritas gratulojn kaj bonajn dezirojn sojle de la dua milo da mesaĝoj.

*Vladimir Opletajev (Surgut)*

## NE MULTNOMBRA, SED EFEKTIVA

Kiam ni rigardas la revuon “Esperanto”, plej ofte estas renkontantaj fotoj pri E-aranĝoj, sur kiuj ni povas vidi multnombrajn partoprenintojn. Antaŭ nelonge en Turkio okazis la vica 5-a Mezorianta Esperanto-Kongreso, kiel oni ĝin titolis. Mi sukcesis ĝin partopreni, unuavice, ĉar ĝis nun mi ne havis eblecon viziti Turkion. La ĉeforganizanto de la aranĝo Murat Ozdizdar invitis min, kaj mi konsentis.

La ĉefa celo de la aranĝo estis evidente praktiko de la lingvo kaj konatiĝo kun unu el regionoj de la lando. Kio estis efektive? La aranĝo kolektis ne tiom multe da partoprenintoj – nur proksimume 40 personoj. Sed estis reprezentitaj fakte ĉiuj 5 kontinentoj de la mondo – Eŭropo, Azio, Afriko, Ameriko, Aŭstralio. La etoso estis tre amikeca. Dank’ al Rafaelo Mateos el Hispanujo por novbakitaj esperantistoj ankaŭ estis organizitaj praktikaj kursoj de la lingvo, kio multe helpis al tiuj.

Do, mi estas certa, ke ĉiuj partoprenintoj de la aranĝo lasis en siaj koroj nur bonajn rememorojn pri la Kongreso kaj jam senpacience atendas la sekvantajn, kiun oni planas okazigi en Armenio.

*Dmitrij Cibulevskij  
(Ukrainio)*





## POŝTMARKO PRI LA 125-JARIĜO DE ES- PERANTO

Por omaĝi la 125-an datrevenon de la apero de la Unua Libro de Esperanto kaj por reklami la lingvon, UEA mendis ĉe la nederlanda kompanio “PostNL” poŝtmarkon kun la jubilea emblemo desegnita de la brita esperantisto Peter Oliver. En marto la jubilea simbolo aperis sur poŝtmarko mendita de Esperanto-Asocio de Finnlando. La nova nederlanda marko estis eldonita sojle de la Malferma Tago de la Centra Oficejo (la 28-a de aprilo), ĝi estas aĉetebla ĉe la Libroservo de UEA, en blokoj po 10 markoj. La poŝtmarko pri la 125-jariĝo de Esperanto estas la kvina laŭ mendo de UEA. La temoj de la unuaj du markoj, aperintaj en 2008, estis la 93-a UK en Roterdamo kaj la 100-a datreveno de la fondo de UEA. Ili ambaŭ estas jam elĉerpitaj, sed ankoraŭ haveblaj estas la poŝtmarkoj pri la 150-a datreveno de L.L.Zamenhof kaj pri la 100-a datreveno de Ivo Lapenna, ambaŭ eldonitaj en 2009.

*Gazetaraj Komunikoj de UEA*

## HISTORIO, NUNO KAJ ESTONTO EN LA APRILA MALFERMA TAGO

D-ro Ulrich Lins estis la ĉefa preleganto en la 36-a Malferma Tago de la Centra Oficejo de UEA sabaton, la 28-an de aprilo. La aranĝo allogis 85 vizitantojn kaj okazis precize 50 jarojn post la translokiĝo de la oficejo al la domo ĉe Nieuwe Binnenweg 176. D-ro Lins, kiu vizitas la UEA-domon jam pli ol kvar jardekojn, prelegis dufoje pri personoj, kiujn li renkontis dum siaj vizitoj, kaj pri movadaj eventoj, ligitaj al CO dum tiu periodo.

La prezidanto de Eŭropa Esperanto-Unio, Seán O’Riain, parolis pri la civitana iniciato por la kantado de la Eŭropa Himno en Esperanto. Flory Witdoeckt vivigis la prelegon kantante la himnon kun la vortoj de Umberto Broccatelli. Lige kun la kunsido de la Estraro de UEA ĉeestis ankaŭ reprezentantoj de TEJO kaj ILEI. Pri TEJO parolis prezidanto Łukasz Żebrowski kaj estrarano Nico Huurman. La ILEI-prezidanto Stefan MacGill rakontis ne nur pri sia organizaĵo sed ankaŭ pri la Esperanto-kurso, speciale kreita kiel kontribuo al la 125-jariĝa jubileo de Esperanto.

Kiel tradicie, la programo komenciĝis per prezentado de libroservaj novaĵoj kaj finiĝis per respondado de estraranoj de UEA al la demandoj de al publiko. Pro sia kunsido (post la Malferma Tago) ĉeestis ses el la sep estraranoj. Samtempe kun la prelegoj oni montris filmojn en alia ĉambro, kie funkciis ankaŭ bazono de esperantistoj. Bone vizitata estis kompreneble ankaŭ la libroservo, kiu vendis librojn kaj aliajn varojn por la suma valoro 1856,80 eŭroj.

La sekva Malferma Tago de la Centra Oficejo estos sabaton, la 24-an de novembro 2012.

*Gazetaraj Komunikoj de UEA*

# la verda Koro

 kultura revuo

## PREPARU E-DONACON POR BORIS STRUGACKIJ

## Estimataj legemuloj!

En 2013 la famega scienc-fikcia verkisto Boris Strugackij venos al sia 80-jara jubileo. Lia nomo estas konata ankaŭ al esperantistoj, ĉar en 1992-2009 la eldonejo “Impeto” publikigis naŭ romanojn de la fratoj Strugackij en la internacia lingvo. Multaj scias ankaŭ (dank’ al la intervjuo, publikigita en “Moskva Gazeto” en 1992), ke Boris Strugackij havas tre pozitivan opinion pri la ideo de internacia helplingvo kaj pri esperanto, kiel realiĝo de tiu ideo.

La eldonejo "Impeto" ŝatus prepari specialan donacon por Boris Strugackij okaze de lia jubileo. Tio estu bone eldonita libreto, kiu enhavos biografiajn notojn, fotojn, kurtajn prezentaĵojn pri la libroj, eldonitaj en esperanto, recenzojn kaj opiniojn de simplaj legantoj. Ni invitas ĉiun legemulon, kiu havis bonŝancon tralegi unu aŭ kelkajn librojn de la fratoj Strugackij, partopreni en la gratullibro per la opinioj pri la legitaĵo kaj per bondeziroj, adresitaj al la aŭtoro.

Viaĵn kontribuojn bonvolu sendi antaŭ la 1-a de oktobro 2012 al la adresoj [<impeto@impeto.ru>](mailto:<impeto@impeto.ru>), [<mamuto@rambler.ru>](mailto:<mamuto@rambler.ru>).

*Mikaelo Bronștejn (Tihvin)*

## NOVA ELDONO DE PLENA LERNOLIBRO

La Moskva eldonejo Impeto publikigis la trian prilaboritan eldonon de mia libro: **Борис Колкер** *“Международный язык эсперанто. Полный учебник”*. La libro estas presita tre bele kaj bindita forte.

Dum kvar jardekoj ĝi estas la plej populara lernolibro por ruslingvanoj. Iom da informoj pri ĝi troviĝas en la retejo “Esperanto Новости” (E-novajtoj): <http://e-novosti.info/forumo/viewtopic.php?t=4103>.

Bonvolu informi kaj rekomendi la novan eldonon al viaj konatoj – esperantistoj kaj neesperantistoj. Vi faros bonan aferon, se vi donacos ekzempleron de la libro al loka biblioteko. Kvankam tiu ĉi lernolibro estas des-

Международный язык **ЭСПЕРАНТО** **ESPERANTO**  
полный учебник plena lernolibro  
*Ворис Калксер*

Самый полный и популярный учебник языка эсперанто.  
Позволяет получить глубокое знание языка и эсперантской культуры.  
Основа для быстрого изучения иностранных языков.

Заказать учебник по почте можно в интернет-магазине издательства Импето:  
[www.lernolibro.ru](http://www.lernolibro.ru)  
Адрес издательства:  
117593 Москва  
Литовский б-р 13/12  
Т.: (495) 427-24-94  
[impeto@impeto.ru](mailto:impeto@impeto.ru)

tinita por ruslingvanoj, ĝiaj tekstoj kaj ekzercoj povas esti interesaj kaj utilaj ankaŭ por personoj, kiuj ne scias la rusan lingvon. La Plena lernolibro estas aĉetebla en grandaj librovendejoj de Moskvo kaj Peterburgo. Rusianoj povas aĉeti ĝin plej malmultekoste ĉe la eldonejo Impeto: <<http://lernolibro.ru/slovari/kolker>>. Personoj ekster Rusio povas aĉeti ĝin plej malmultekoste ĉe la Moskva reta librovendejo: <<http://libroesperanta.ru/index.php?productID=783>>, aŭ oni skribu al Mikaelo Ĉertilov laŭ la retadreso <[esperanto@email.ru](mailto:esperanto@email.ru)> kaj <[mikaelo@km.ru](mailto:mikaelo@km.ru)>.

Ruslingvaj neesperantistoj estas inviteblaj studi senpage per tiu ĉi lernolibro en la interreta distanca kurso: <<http://esperanto-kurso.ikso.net/>>.

Malnova versio de la lernolibro troviĝas en la retejo de Jurio Finkel: <<http://www.esperanto.mv.ru/Lernolibro/index.html>>.

Vi povas skribi vian komenton pri la Plena lernolibro en la retejo “Esperanto Новости”: <<http://e-novosti.info/forumo/viewtopic.php?t=4103>> kaj en la interreta librovendejo Ozon.ru: <<http://www.ozon.ru/context/detail/id/4612093/>>.

**Boris Kolker,**  
*ĉiĉerono en Esperanto-lando*

## PRI LA ROMANCO DE S.TANEJEV “LA PREĜO”

Iun tagon al mi telefonis konata esperantisto – Ergard Budagian, kiu proponis al

mi ellerni kaj kanti al la esperantistoj la romancon de S.Tanejev “La Preĝo” laŭ la versajo de M.Lermontov, esperantigita de Leo Belmont. Mi konsentis. Ergard sendis al mi perrete notan tekston por la voĉo kaj piano kun la rusaj vortoj kaj, sur aparta paĝo, la Esperantan tradukon.

Poste komenciĝis skualo de demandoj. Vere, Ergard avertis min, ke estas ia malakordo inter la nota teksto kaj la vortoj, tiel ke mi devos iomete peni, kunigante la Esperantan tekston kun la notoj.

Mi komencas kompari la rusan kaj la Es-

**Молитва**

В минуту жизни трудную

Муз. С. Танеев  
Стихи М. Лермонтов

Э. Т.

SE PREMAS MIN DO - LO - RO EN

MALFA-CI-LA' - HOR' LA PREĜON MI EN KO - RO RI - PETAS EL ME-

MOR', RI - PE-TAS EL ME - MOR'. LA

perantan tekstojn, la  
poeziaĵon de  
M.Lermontov kun la  
traduko de  
L.Belmont, kaj mi  
klarigis, ke ĉi tiuj  
versaĵoj ne kongruas  
laŭ sumo de silaboj  
en iuj linioj. Ĉe Ler-  
montova versaĵo ak-  
centoj estas sur la  
tria silabo en la lastaj  
vortoj de linioj, sed  
ĉe Belmont – sur la  
dua. Sekve en la fino  
de linio estas be-  
zonata ankoraŭ unu  
silabo, por ne mis-  
formi la melodion.  
Kaj tiel plu en ĉiuj  
neparaj linioj de ĉiuj  
tri strofoj.

La plej ŝoka sur-  
prizo evidentiĝis  
dum komparado de

la triaj linioj de la triaj strofoj. Ĉu la tradukisto L.Belmont supozis, ke lia teksto en tiu ĉi loko ne kuniĝos kun la estonta romano de Tanejev, aŭ Tanejev tie ĉi distribuis la ritmon de vortoj ne tiel, kiel notis lia disĉiplo L.Sabanejev (kiu konservis la kopion de la romano kun rusaj vortoj)? Ĉu entute eblas kanti la Esperantan varianton de Belmont je la ritma “pako” de Sabanejev?

Kie serĉi respondojn al la koŝmaro de demandoj? Kion fari? Tiam mi decidis komplete akomodi la romancon al miaj modestaj kantaj povoj. Tiamaniere:

1. Por pli facile kanti, mi por mi aliigis la kleon el “F-dur” al “A-dur”.
2. Por pli facile komenci kantadon, mi aldonis antaŭ la unua takto ankoraŭ takton, kvazaŭ samspece malgrandan preludon.
3. Kelkloke mi etendis ligojn en la melodion por oportuna kantado de la vortfinoj en la neparaj linioj.
4. Mi aldonis konformajn Esperantajn vortojn en tiuj lokoj, kie Sabanejev (aŭ Tanejev?) faris ripeton de la rusaj vortoj.
5. Por enpremi la Esperantajn vortojn en 7 kaj 8 taktojn, nombrante el la fino, mi aliigis ritmon en tiu ĉi parto de la melodio, konformiginte ĝin kun la vortoj.
6. Ĉar kanti kaj samtempe akompani al si estas tre malfacile, mi registris en mian komputilon la sonan akompanion aparte en formo de “muzminuso”.

7. La akompanaĵon-  
“muzminusaĵon” mi  
kuragiŝ registri kiel due-  
ton de harpo kun vio-  
lono.

Jen estas ĉiuj aferoj.  
Poste mi simple trakan-  
tis la romancon sub mia  
harpa-violona muzmi-  
nuso en A-dur, registris  
kaj transformis la rezul-  
ton el muzikformato  
“wav” en “mp3”.

Kaj poste mi lokis  
mian koncertadon en la  
Interreton (ĉe “Mus-  
Parads.ru”, en la rubriko  
“Classical”) sub titolo  
“Ермита. Молитва (на  
эсперанто)”.

Aldonaĵo: Mia vari-  
anto de la notteksto kun  
miaj refaroj.

**Ермита Тархан**  
(Moskvo)

LO-RAS, NE DO - LO - RAS, D'A - NIM' EK - FA-LAS FOR...

KAJ O - NI KRE - - - DAS, PLO - RAS,

KAJ FA-CI-LI-ĜAS, FA-CI-LI - ĜAS KOR'.

1. В минуту жизни трудную,  
Теснится ль в сердце грусть,  
Одну молитву чудную  
Твержу я наизусть.

2. Есть сила благодатная  
В созвучьи слов живых  
И дышит благодатная  
Святая прелесть в них.

3. С души как бремя скатится,  
Сомненья далеко,  
И дышится, и плачется.  
И так легко, легко...



## VERKO DE KAREL ČAPEK EN LA SERIO “ORIENTO-OKCIDENTO”

Unu el la novaj libroj lanĉitaj en la aprila Malferma Tago de la Centra Oficejo estas *R.U.R.*, la fama dramo de Karel Čapek (1890-1938), kies dua Esperanta eldono aperis ĉe KAVA-PECH kiel n-ro 47 en la serio “Oriento-Okcidento” de UEA. En Roterdamo la eldonisto Petr Chrdle mem prezentis la libron, kiu precipe famiĝis pro la vorto “roboto”. La plena titolo de la verko estas *Rossumaj Universalaj Robotoj*. La Esperanta traduko de *R.U.R.* estis farita kaj unuafoje eldonita en 1926 de Moraviaj Esperanto-Pioniroj. El la



klarigo en la dua eldono oni tamen ekscias, ke la reala tradukinto estis Josef Ĥebiĉek (1875-1960). Ĉar li mem ne deziris aperi propranome kiel tradukinto, ankaŭ la nova eldono respektas lian deziron sur sia titolpaĝo. La bele realigita reeldono estas ilustrita de Miroslava Tomeĉková. La libro havas 119 paĝojn.

*Gazetaraj Komunikoj de UEA*

## UEA ELDONIS KOLEKTON DE PREMIITAJ ESEJOJ PRI LA ESPERANTA LITERATURO

Por prezento en la Universala Kongreso en Hanojo aperis la libro ***Pri homoj kaj verkoj***, kun dek unu eseoj de naŭ aŭtoroj. La eseoj, premiitaj en la Belartaj Konkursoj de UEA, traktas la Esperanto-literaturon kaj ankaŭ pli vaste la Esperanto-kulturon. La 143-paĝa libro estas redaktita de Humphrey Tonkin kaj Michela Lipari, respektive la nunaj prezidanto kaj sekretario de la Belartaj Konkursoj.

La libro enhavas jenajn eseojn: *Rolo de la persona faktoro en la Esperanta literaturo: la verkisto* (Eva Tófalvi), *Ni ne entombigu niajn literaturajn trezorojn: kelkaj pensoj pri la Esperanto-literaturo, ĝiaj legantoj kaj eldonejoj* (Lena Karpunina), *La Vojo* (Carmel Mallia), *Ĝoje sonu mia kanto: la vivo kaj verkoj de Marie Hankel* (Krys Ungar), *Kiel legi – ĉu legi – Stellan Engholm?* (Sten Johansson), *La du testamentoj de Sándor Szathmári* (Eva Tófalvi), *La lirika itinero de Miguel Fernández* (Gonçalo Neves), *Bohemia amoro: Karolo Piĉ kaj Eli Urbanová* (Sten Johansson), *Arkaika parolado en Esperanto* (Alberto García Fumero), *La kvara periodo en Esperanta literaturo* (Jukka Pietiläinen), kaj *Pri la periodoj de la Esperanta literaturo* (Geoffrey Sutton).

En la enkonduko, *Literaturo kaj interliteraturo*, Humphrey Tonkin resumas kaj komentas la unuopajn eseojn. En la postparolo Nicola Minnaja rakontas, kiel ekestis la ideo starigi la esean branĉon de la Belartaj Konkursoj memore al lia patro Luigi Minnaja.

Humphrey Tonkin skribas en la enkonduko:

*Zamenhof ne nur montris la vojon, sed ankaŭ verkis la vojon. Nia literaturo estas interalie ilo de la memdifino, necesa elemento en la Esperanto-socio de hodiaŭ kaj morgaŭ. Bela flankoprodukto de la esekonkurso nomata laŭ la elstara Esperanto-aktivulo Luigi Minnaja estas tiu ekzempligo de la nedisigeblo de literaturo, lingvo, socio kaj movado. Kiel prave memorigas nin lia filo Nicola Minnaja en sia postparolo, plaĉus al Luigi Minnaja, ke tiu ĉi konkursobranĉo portu lian nomon. La fakto, ke ĝi floras kaj kreskas 35 jarojn post la lanĉo estas plia signo, ke la Esperanto-verkado prosperas, kaj ke Luigi Minnaja estas digne kaj danke memorata*

*Gazetaraj Komunikoj de UEA*



## **Kukolido**

Kukolino sidis sur betulo en bosko.

Ĉirkaŭ ŝi ĉiumomente aperadis-malaperadis flugiloj. Birdoj klopode tumultis inter arboj. Trovinte allogan lokon ili portis jen plumeton, jen muskon, jen herbon.

Baldaŭ en la mondo devos aperi malgrandaj birdidoj. La birdoj prizorgis la birdidojn. Ili rapidis nesti, konstrui, modli.

Sed Kukolino havis propran zorgon. Ŝi ja scipovis nek neston konstrui, nek birdidon eduki. Ŝi sidis kaj pensis:

“Jen mi sidu ĉi tie kaj observu la birdojn. Kiu pli bone konstruos sian neston, al tiu mi metu mian ovon.”

Kaj kukolino observis birdojn, kaŝinte sin en densa foliaro. Birdoj ne atentis ŝin.

Motacilo, Pipio kaj Filoskopio konstruis siajn nestojn sur tero. Ili tiel bone kaŝis ilin en herbo, ke eĉ je du paŝoj la nestoj ne estis videblaj.

Kukolino pensis:

“Tiu nestoj estas lerte kaŝitaj! Tamen se neatendite venos Bovino kaj senintence paŝos sur neston, do ŝi dispremos mian birdidon. Mi metu mian ovon nek al Motacilo, nek al Pipio, nek al Filoskopio.”

Kaj ŝi komencis observi aliajn nestojn.

Najtingalo kaj Silvio konstruis nestojn en arbustoj.

Al Kukolino plaĉis iliaj nestoj. Sed tiam venis ŝtelema Garolo kun bluaj plumoj sur flugiloj. Ĉiuj birdoj sin jetis al Garolo penante forpeli ŝin de siaj nestoj.

Kukolino pensis:

“Garolo trovos ajnan neston, eĉ nestojn de Najtingalo kaj Silvio. Ŝi ankaŭ mian birdidon ŝtelos. Kien do mi metu mian ovon?”

Dum tiu momento antaŭ la okuloj de Kukolino aperis malgranda Muŝkaptulino-Hipolao. Ŝi flugis el kavo de maljuna tilio por helpi al birdoj forpeli Garolon.

“Jen estas bonega nesto por mia birdido! – pensis Kukolino. – En la kavo Bovino ne dispremos ĝin kaj Garolo ne atingos. Mi metu mian ovon al Hipolao!”. Poste ŝi kaptis ĝin per beko, flugis al la tilio, ŝovis la kapon en la kavon kaj singarde metis la ovon en la neston de Hipolao.

Kukolino tre ĝojis, ke fine trovis fidindan lokon por sia birdido.

“Jen kia mi estas lerta! – pensis ŝi, forflugante. – Ne ĉiu kukolino konjektus meti sian ovon en kavon de Hipolao”.

Birdoj forpelis Garolon el la bosko, kaj Hipolao revenis en sian kavon. Ŝi eĉ ne rimarkis, ke en la nesto aperis unu aldona ovo. La nova ovo estis preskaŭ same malgranda, kiel ajna el ŝiaj kvar ovo. Ŝi devus rekalkuli ilin, sed la malgranda Hipolao ne scipovis kalkuli eĉ ĝis tri. Ŝi trankvile sidiĝis kovi birdidojn. Kovadi ŝi devis longe, plenajn du semajnojn. Sed Hipolao ne enuis.

Ŝi ŝatis sidi en sia kavo. La kavo estis nek larĝa, nek profunda, sed tre komforta. Al Hipolao pleje plaĉis, ke eniro de la kavo estis tute mallarĝa. Ŝi mem pene penetris tien. Tamen ŝi estis trankvila, ke neniuj interniĝos en ŝia nesto, kiam ŝi for-

flugos serĉi nutraĵon por siaj birdidoj.

Kiam Hipolao volis manĝi, ŝi vokis sian edzon – buntan Muŝkaptulon. Muŝkaptulo venis kaj sidiĝis sur ŝian lokon. Li pacience atendis dum Hipolao ĝissate manĝis papiliojn, kulojn kaj muŝojn. Kiam ŝi revenis, li suprenflugis sur branĉon, ĝuste kontraŭ la kavo, kaj gaje kantis:

“Tc! Kruti, kruti! Kruti, kruti!” (en birda lingvo tio signifas “Turnu, turnu! Turnu, turnu!”) – samtempe li rapide turnis sian rektan nigran voston kaj skuettis buntajn flugiletojn.

Kurta estis lia kanto, sed Hipolao ĉiam aŭskultis ĝin kun plezuro.

Fine Hipolao eksentis, kvazaŭ iu moviĝas sub ŝi. Tiu estis unua birdido – nuda, blinda. Ĝi baraktis inter ovaj ŝeloj. Hipolao tuj forportis la ŝelon el nesto.

Baldaŭ enmondiĝis ankoraŭ tri birdidoj. Do por Hipolao kaj Muŝkaptulo aldoniĝis klopodoj. Necesis nutri la kvar birdidojn kaj kovi la kvinan ovon.

Tiel pasis kelkaj tagoj. La kvar birdidoj iom kreskis kaj kovriĝis per lanugeto.

Nur nun eloviĝis la kvina birdido. Ĝi havis tre dikan kapon, grandegan buŝon, kovritajn per haŭteto elstarajn okulojn. Kaj generale ĝi tuta estis ia muskoleca, malgracia.

Muŝkaptulo diris:

– Ial ne plaĉas al mi tiu kriplulo. Ni forĵetu ĝin el la nesto!

– Kion vi diras! – ektimis Hipolao. – Ja ĝi ne kulpas, ke naskiĝis tia.

Ekde tiu momento Muŝkaptulo kaj Hipolao ne plu havis ripozon. Ĝis nokto ili portadis nutraĵon al birdidoj kaj purigis la neston. Pli ol ĉiuj manĝis la kvina birdido.

Sed en la tria tago okazis malfeliĉo.

Muŝkaptulo kaj Hipolao forflugis serĉi nutraĵon. Reveninte, ili ekvidis du siajn lanugajn birdidojn sur tero sub tilio. La birdidoj batiĝis per siaj kapoj kontraŭ arba radiko kaj ĝismorte vundiĝis.

Kiamaniere ili povis fali el la kavo?

Hipolao kaj Muŝkaptulo ne havis tempon por malĝoji kaj pripensi. La restintaj birdidoj laŭte kriis pro malsato. Pli laŭte ol ĉiuj kriis la kriplulo. Hipolao kaj Muŝkaptulo laŭvice ŝovis alportitan nutraĵon en lian buŝon kaj ree forflugis.

Tuj poste la kriplulo subfosis unu el la restintaj en la kavo fratetoj per dorso antaŭen. La frateto baraktis iom kaj nestiĝis en kaveto sur la dorso de la kriplulo.

Tiam la kriplulo apogis sin per la kapo al profundo de la kavo. Kiel per manoj, ĝi apogis sin per la nudaj maldikaj flugiletoj al muroj kaj per dorso antaŭen komencis retiriĝi el kavo.

Jen lanuga birdido, sidante en kaveto sur la dorso de la kriplulo, montriĝis en aperturo de la kavo. Dum tiu tempo Hipolao proksimiĝis al la tilio kun papilio en la beko. Kaj ŝi ekvidis kiel subite demalsupre iu suprenĵetis ŝian lanugan birdidon.

La birdido flugis el la nesto, senhelpe renversiĝis en aero kaj falis sur teron.

La terurita Hipolao ellasis la papilion, ekkriis kaj ĵetis sin al la birdido. Sed tiu jam estis mortinta.

Ankaŭ ĉi-foje Hipolao ne komprenis, ke elĵetas ŝiajn lanugajn birdidojn el kavo la birdido-kriplulo. Kiu do povus kredi, ke ĝi estas tia malbonagulo? Ja ĝi havis nur tri tagojn ekde la naskiĝo. Ĝi estis ankoraŭ tute nuda kaj blinda.

Kiam Hipolao forflugis, ĝi same sidigis sur sian dorson la kvaran, lastan frate-ton. Kaj same, per la kapo kaj la flugiletoj, neatendite elpuŝis lin el la kavo per forta puŝo.

Nun ĝi restis en la nesto sola. Muŝkaptulo kaj Hipolao multe malĝojis pri siaj lanugaj birdidoj, sed fari eblis nenion – ili komencis nutri la solan kriplulon. Kaj ĝi kreskis ne nur dum tagoj, sed eĉ dum horoj. Ĝiaj okuloj malfermiĝis.

– Vidu, kia ĝi iĝis dika, – diris Muŝkaptulo al Hipolao, kiam ili renkontiĝis ĉe la kavo, ĉiu kun muŝeto en la beko. – Kaj tiu manĝegulo estas kiel nesatigebla diablido!

Sed Hipolao ne plu timis pri la filo. Ŝi sciis, ke la bonkora Muŝkaptulo grum-blas ŝerce.

Kaj tiu nesatigebla birdido ĉiam kreskis pli kaj pli. Ankaŭ lia manĝegemo kre-skis kune kun li. Kiom ajn oni alportu manĝon, ĉiam tio ne sufiĉis por li.

Li jam tiel elkreskis, ke plenigis per si la tutan kavon. Li kovriĝis per makulaj rufaj plumoj, sed ĉiam ankoraŭ pepis, kiel malgranda, kaj petis manĝi.

– Kion ni faru? – maltrankvile demandis Muŝkaptulo al Hipolao. – Li jam su-perkreskis nin. Kaj li tute ne similas al juna Muŝkaptulo.

– Ankaŭ mi vidas, – triste respondis Hipolao, – ke li ne estas nia propra filo. Li estas Kukolido. Sed nun ja nenion eblas fari: ne eblas lasi lin morti pro malsato. Li estas nia adoptita filo. Ni devas plennutri lin.

Kaj ili nutris lin de mateno ĝis nokto.

La somero finiĝis. Ĉiam pli ofte blovis forta aŭtuna vento. La maljuna tilio tremis kaj knaris sub venta puŝblovo. Birdoj el la bosko pretis flugi suden.

Motacilo, Pipio, Filoskopo, Najtingalo kaj Silvio ekvojaĝis kun siaj birdidoj. Ili vokis ankaŭ Muŝkaptulon kaj Hipolaon.

Sed tiuj nur silente balancis la kapojn kaj montris al la maljuna tilio. El ĝia kavo aŭdiĝis malsata pepo kaj elŝoviĝis larĝe malfermita beko de Kukolido.

Hipolao ĉiutage insiste petis lin elnestiĝi.

– Vidu, – ŝi diris al li, – jam ekmalvarmis. Al ci kaj al ni tempas forflugi de ĉi tie. Jam estas danĝere resti en la nesto: vento ĉiutage plifortiĝas kaj hazarde povas rompi la maljunan tilion!

Sed Kukolido nur turnis la kapon kaj ĉiam restis en la kavo.

Venis malvarma aŭtuno, komencis malaperi muŝoj kaj papilioj. Fine Muŝkap-tulo diris al Hipolao:

– Ni ne plu povas resti ĉi tie. Flugu ni, flugu ni, dum ni mem ne mortis pro mal-sato. Tutegale ni ne plu havas per kio nutri Kukolidon. Sen ni li baldaŭ malsatiĝos kaj elkaviĝos.

Hipolao devis obei la edzon. La lastan fojon ili nutris sian adoptulon, poste for-flugis el la bosko kaj direktis sin al sudo.

Kukolido restis sola. Baldaŭ li ekvolis manĝi kaj komencis krei. Neniu flugis al li.

Vane li penis ŝovi la kapon pli malproksimen el la kavo, turnis la kapon ĉiu-flanken kaj kriis ĉiam pli laŭte. Hipolao kaj Muŝkaptulo jam estis malproksime kaj ne povis aŭdi lin. Vespere li raŭkiĝis pro la kriado, sed ankoraŭ plu sidis en la nesto.

Nokte komenciĝis tempesto. Pluvo torentis en la kavon.

Kukolido enŝultrigis la kapon kaj sidis, preminte sin al muro. Li tuta tremis pro malvarmo kaj timego.

Vento tiel fortis, ke la maljuna tilio balanciĝis, kiel herbeto, kaj laŭte knaris. Ŝajnis, jen-jen ĝi krakos de la radiko ĝis la pinto.

Matene la tempesto trankviliĝis. Kukolido ankoraŭ plu sidis, preminte sin al muro. Li ankoraŭ ne povis rekonsciiĝi pro timego.

Kiam la suno leviĝis alte, tiam la radioj trapenetris la kavon kaj varmigis la malsekan Kukolidon.

Dum la nokto al li revenis la voĉo. Sed li jam tiel malfortiĝis pro la malsato, ke ne povis leviĝi kaj elkaviĝi la kapon.

Tage en la boskon venis Knabo kaj Knabino.

Vento levadis de sur tero flavajn foliojn kaj turnis ilin en aero. La infanoj postkuris kaj kaptadis ilin. Poste ili komencis kaŝludi. Knabo kaŝiĝis malantaŭ la trunko de la maljuna tilio.

Subite li ŝajne ekaŭdis birdan krion el profundo de la arbo. Knabo levis sian kapon, ekvidis kavon kaj grimpis sur la arbon.

– Venu ĉi tien! – li kriis al la fratino. – Ĉi tie en la kavo kukolo sidas.

Knabino alkuris kaj petis la fraton akiri la birdon por ŝi.

– Mi ne povas ŝovi manon en la kavon! – diris Knabo. – La truo estas tro mal-larĝa.

– Do mi timigu la kukolon, – diris Knabino, – kaj vi kaptu ĝin, kiam ĝi komencos elkaviĝi.

Knabino ekbatis la trunkon per bastono.

En la kavo komenciĝis surdiga bruo. Kukolido, kolektante lastajn fortojn, apogis sin al muroj per la piedoj kaj la flugiloj kaj strebis elkaviĝi. Sed kiel ajn penante, li ne povis trapuŝiĝi eksteren.

– Vidu! – kriis Knabino, – la kukolo ne povas eliri: ĝi estas tro dika.

– Atendu, – diris Knabo, – tuj mi eltiros ĝin.

Li elpoŝigis tranĉileton kaj per ĝi plilarĝigis la enirejon en la kavon. Li estis devigita tranĉi larĝan truon en la arbo, antaŭ ol sukcesis eltiri Kukolidon el ĝi. Kukolido delonge jam iĝis granda kukolo kaj estis trioble pli dika ol lia adopta patrino – Hipolao. Sed pro longa sidado en la kavo li estis tre mallerta kaj ne scipovis flugi.

– Ni prenu kun ni kaj kaj nutru lin, – decidis la infanoj.

\* \* \*

Preter malplena tilio birdoj flugis suden. Inter ili estis ankaŭ Kukolino.

Ŝi ekvidis la kavon, kien printempe metis sian ovon, kaj denove ekpensis:

“Kia mi estas lerta! Kiel bone mi lokumis mian birdidon! Kie li estas nun? Verŝajne, mi renkontos lin en sudo.”

Kaj ŝi flugis pluen pli rapide.

*Esperantigis Nina Djomuškina (Sjasjstroj)*

# ***Klara Ilutoviĉ (Elektrostalj)***

## **Antaŭsomere**

Tempo de tendaroj, tempo de kongresoj –

Ĝoju pri somero, esperantistar’!

Vokoj kaj espero, revoj kaj promesoj –

Kantas en l’ animo ties malavar’.

Fluas bondezire, je salut’ mirlanda,

Feste vigligante, l’ amikeca ond’,

Kaj kongres’ nomeblas ja tendaro granda

Por esperantistoj de la tuta mond’.

Nure-nur dek tagoj en Esperantio

Aŭ eĉ pli malmulte – l’ magra tempolim’,

Sed impresoj kantas, kaj sugestas ĉio

Bonon inter homoj, sen ofend’ aŭ tim’.

Svarmas programeroj, bolas ĝoj’ senlace

Per la bonefika Esperanto-vort’.

Ŝajnas, ke ĝi vere sonas ĝojdonace,

Kunigante homojn per l’ amika fort’.

En etoso loge varma kaj bonfida

Venas ĉu-magie povoj kaj aŭdac’.

Perdas vere multe ĉiu hejmesida,

Kiu sin senigas je tendara grac’!

## **Somere**

Buntas la tero

Verdaĵe kaj flore.

Brilu l’ somero

Je l’ viv’ riĉkoloro!

Verŝas l’ aero

Bongustajn promesojn.

Sendu l’ somero

Ĝojgajn impresojn!

Kantas l’ espero

Pri dolĉaj ferioj.

Floru l’ somero

Sen anomalioj!

Lasu riveron

Da premoj kaj tristoj!

Bonan someron

Al esperantistoj!



# Elurbiĝo jubilea

Tiĥvinaj esperantistoj elurbiĝas regule. Okazanta ĉiam en la unua somera semajnfino, la elurbiĝo markas finon de vica kluba laborsezono. La aranĝo okazas vere tradicie kaj regule – spite al la veterkapricoj. Se la vetero donacas varman sunan tagon – ni festas en la naturo, se pluvas kaj malvarmas, la festo okazas subtegmente en ies somerdomo. Pli aŭ malpli amasaj, la elurbiĝoj okazadis dum dek kvar antaŭaj eksomeroj. Sed la pasinta laborsezono estis ege malfacila por la klubo pro perdo de kelkaj el la plej aktivaj klubanoj, ve – inter ili ankaŭ la prezidanto, Viktoro Kandalinskij, kiu ekde septembro 2011 ekloĝis en Peterburgo. Iel-tiel la laboro daŭris en kutima ordo: funkciis kurso por komencantoj, pli-malpli vikle okazadis la klubkunvenoj... Tamen manko de la “fuĝintoj” dum la lernojararo estis ege sentebla, kaj pri la dekkvina, jubilea elurbiĝo estis gravaj duboj. Nur kvin aŭ ses geuloj anticipe esprimis deziron festi – tiom etkvante ni neniam elurbiĝis antaŭe. Sed ja okazis! Por la 3-a de junio maturiĝis bonkvanta grupo el dek du personoj kaj unu esperantista vertago. Malgraŭ la pluvproгноzoj estis donacita al ni ne tro varma, sed agrable senpluva tago, kaj je la deka dimanĉo ni startis eksterurban per tri aŭtoj. Cetere, la mondfama esperantista maratonisto Aleksandr Belov rifuzis uzi aŭton kaj la dekkilometran distancon ĝis la bivako konkeris kure.



La tuttaga programo estis atentokapta, senenua kaj alloga. La premion pro lingvoscio por komencantoj novaj kaj eternaj ricevis Lena Zavjazkina. La familiajn poziciojn firmigis ŝia edzo Aleksandr, gajninta la unuan lokon en “dart”-konkuro. Por



ni ĉarme kantis Vera Vlasova kaj Olĵa Tiĥomirova. Samtempe kelkaj geuloj, helpataj de la vertago Goŝa, umis ĉe la fajrujo, preparante ŝaŝlikojn. Tiuj vere estis bongustegaj – tion konfirmis ĉiuj elurbiĝintoj aplaŭde, sed Goŝa per laŭta bojo. La ĉetabla parto, garnita per la unuaj verdaĵoj de niaj legomĝardenoj, per ruĝa sekvino kaj, kompreneble, per la ŝaŝlikoj, pasis memorinde kun gajaj ŝercoj kaj aktiva maĉado...

La sola bedaŭreto komuna estis, ke ĉi-foje neniu aliurbano/alilandano gastis dum nia jubilea elurbiĝo. Homoj, venu sekvantjare! Certe, vi ne bedaŭros.

***Mikaelo Bronŝtejn (Tiĥvin)***

# TUTMONDA KER-EKZAMENO EN MOSKVO KAJ BONAERO

